


# ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet ♦ lokakuu ♦ oktobro ♦ 5/2005



*Maloŭte havas la ĉef-  
redaktora biciklo la okazon  
trafi en saman foton kun  
neĝe kovrita montpinto, sed  
tion ofertis transiro de la  
Tatra montaro. – Artikolo  
pri IJK sur p. 14.*



**Zamenhof ajattelijana, s. 22**

**Heta Kesälä honora membro de UEA, p. 21**

**Raportoj pri someraj aranĝoj, p. 5-15 ♦ Fabelkonkurso, p. 16**

# ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet

ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen aikakauslehti. Suomen Esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.

Språkpolitisk tidskrift. Organ för Finlands Esperantoförbund.

Lingvopolitika periodaĵo. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.

Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.

Esperanta Finnlando 1918-23, 1948-53, 1959-1987.

Ilmestyy kuusi kertaa vuodessa. Utkommer sex gånger i året. Aperas sesfoje jare.

**Toimitusryhmä/Redaktionsgrupp/Redakta grupo:** ✉ eaflehti@esperanto.fi

Päätoimittaja/Chefredaktör/Ĉefredaktoro: *Mikko Mäkitalo*

Vanha Hämeentie 41 as. 9, 20540 Turku. ☎ (02) 2373 848 ✉ ef\_redakto@surfeu.fi

Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Ilkka Santtila*

Mannerheimintie 40 D 86, 00100 Helsinki. ☎ (09) 587 6738 ✉ ilkka.santtila@welho.com

Vastaava toimittaja/Ansvarig redaktör/Respondeca redaktoro: *Anna Ritamäki*

**Tilauhinta/Prenumerationspris/Abonprezo:** 15 e/vuosi/år/jaro;

Jäsenille/ För medlemmar/ Por membroj: 10 e.

**Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:**

Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ (09) 715 538 ✉ eaf@esperanto.fi

Prenumerationer, adressförändringar: EAF, Broholmögatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.

Pankkitili/Bankkonto: Sampo 800017-230825.

Julkaisija/utgivare/eldonanto: Suomen Esperantoliitto ry – Esperanto-Asocio de Finnlando.

Painosmäärä/Eldonkvanto: 400

## Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto ry

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

**Prezidanto/Puheenjohtaja/Ordförande:** *Anna Ritamäki*

Brokärrvägen 89, 25700 Kimito. ☎ (02) 423 146 ✉ (02) 423 246 ✉ eafprezidanto@esperanto.fi

**Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja/Vice ordförande:** *Päivi Saarinen*

Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ paivi.saarinen@iki.fi

**Sekretario/Sihtööri/Sekreterare:** *Tiina Oittinen*

Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ (02) 230 5319 ✉ eafsekretario@esperanto.fi

**Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet / Övriga styrelsemedlemmar:**

tuomo.grundstrom

*Tuomo Grundström*, Anundilankatu 3, 26100 Rauma. ☎ (050) 5180 590, (02) 822 7779 ✉ @lailanet.fi

*Taneli Huuskonen*, Lapinlahdenkatu 23 A 7, 00180 Helsinki. ☎ (09) 694 0964 ✉ taneli.huuskonen@netsonic.fi

*Markku Saastamoinen*, Siukolantie 9 H 12, 33470 Ylöjärvi. ☎ (050) 327 8528 ✉ markku.saastamoinen@jippii.fi

*Auli Vihermä*, Riisikuja 11 G, 90460 Oulunsalo. ☎ (08) 554 5587 ✉ auli.viherma@pp.inet.fi

**Vicestraranoj/Varajäsenet/Suppleanter:**

*Timo Pirinen*, Rinnetie 11-13 D 32, 06650 Hamari. ☎ (040) 592 1756 ✉ timo.pirinen@gmail.com

*Raita Pyhälä*, Jykyrintie 3, 69440 Lestijärvi. ☎ (06) 863 7351 ✉ saliko@kase.fi

*Eero Rinta-Karjanmaa*, Poppelikatu 11-13 A 24, 15520 Lahti. ☎ (03) 783 4448

**Kasisto/Rahastonhoitaja/Kassör:** *Anna-Liisa Heikkinen*

Asiakkaankatu 2 G, 00930 Helsinki. ☎ (09) 343 1449 ✉ eafkasisto@esperanto.fi

**Pankkitili/Bankkonto (EAF):** Sampo 800017-230825.

**Peranto de UEA / Maksut UEA:lle / Betalningar till UEA:**

Sampo 800020-5995369 (UEA/EAF Päivi Saarinen)

Adreso ĉe la EAF-oficejo. / Käytä Suomen Esperantoliiton toimiston osoitetta.

**Officejo/Toimisto/Kontor:** Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17-19.

☎ (09) 715 538 (puh.vastaaja/respondilo). Malfermita: marde 17-19-a horo.

**Internet:** <http://www.esperanto.fi>



## Idekolektaj notoj prezare al festa jaro

“Ni strebas krei favorajn kondiĉojn por tuttjara, tutlanda, ĉiuinspira festo.” Tiel mi en la pasintnumera raporto pri la projekto Al kvalita komunikado difinis la ĉefan fokuson de Esperanto-Asocio de Finnlando, la preparojn por la centjariĝo en 2007.


Pluraj ideoj jam prezentiĝis, jen nur kelkaj notoj:

- ◆ Ĉu nomo por la festado, ekzemple Centjariĝo, aŭ iu temo, simbolo, slogano? Preparojn por UK 1995 ni nomis Projekto 1995. Tiam deko da prepareseminarioj, ĉu simile nun?
- ◆ Granda ĉeffesto en la naskiĝtago de EAF 28.4, estas sabato, UEA-prezidanto jam invitita, ĉu lige al la fondiĝadreso (Pohjoisesplanadi – Norra Esplanaden 39), ĉu loko ligita al UK 1922?
- ◆ “Multspecaj eventoj, ke ni ne tediĝu”
- ◆ Bonega kultura programo, ĉu internacia festivalo antaŭ UK en Jokohamo, grupa vojaĝo al Japanio, KEF denove aŭ io alia, ankaŭ muzikfestivaloj, Billnäs, Kaustinen?
- ◆ Propra poŝtmarko, poŝtŝtampo, glumarkoj, afiŝoj, broŝuroj ... – la plej granda esperantoflago, esperantobakaĵo de iu konata konditorio, esperantokoktelo, verda kolbaso ... (rido)
- ◆ Monfontoj, kulturaj fondaĵoj, projektsubvencioj de EU, edukministerio simile al la nacia vespero de UK 1995, kiu havos tempon esplori? Monkolekton de urboj kaj komunumoj, firmaoj,

asocioj kaj individuoj, anoncoj en EF, loterio ... 100 mil eŭroj por la 100-jarulo.

- ◆ Jubilea ondo: Polusstelo 3.4.2006 (la antaŭulo de Esperantoklubo de Helsinki), Sveda Esperanto-Federacio 2006, UEA 2008 kaj Dana 2008
  - ◆ Suurin suomalainen esperantisti (Grandioza esperantisto, laŭ simila konkurso en televido), ĉiunumere prezentoj, la membroj voĉdonu. Ĉu jam elektu ses kandidatojn (ekz. Vilho Setälä, Nino Runeberg, Liisi Oterma, Veli Kolari, Johannes Leppäkoski, Joel Vilkki) aŭ ĉu peti unue proponojn de la legantoj? Ĉu la ĉefredaktoro ricevus la necesan helpon pri planado, kandidatoj, prezentoj?
  - ◆ Serio da artikoloj kun ilustraĵoj transprenebla de gazetoj en Finnlando.
  - ◆ Bona afero ke Jukka Pietiläinen nun stipendie prilaboras tekstojn por finnlingva libro pri Esperanto.
  - ◆ La estraro de EAF deziras konatiĝi kun siaj anoj en la tuta lando, lerni pri agado, kolekti ideojn, diskuti. Invitoj bonvenas.
- EAF havas jubileidean notlibron. Ideoj, komentoj kaj konkretaj proponoj, helpofertoj ktp. bonvenas. Iom post iom ni konkretigu, taksu kio estas realigebla kaj kiel. Nun ni pensu vaste kaj ambicie!

*Anna Ritamäki*



## Celoj por la mondo

En jaro 2000 la Unuiĝintaj Nacioj lanĉis projekton, kiun oni konas per nomo de la jarmilaj celoj. La ambicia celo estas ĝis jaro 2015 atingi signifan progreson en pluraj vidpunktoj koncernantaj la kvaliton de homa vivo. La jarmilaj celoj estas koncize:

1. Duonigi ekstreman malriĉecon kaj malsatecon.
2. Ebligi bazan edukadon por ĉiu homo.
3. Progresigi la egalecon de la seksoj kaj plibonigi situacion de virinoj.
4. Malplimulti mortiĝoj de infanoj.
5. Bonigi sanstaton de gravedaj patrinoj.
6. Malrapidigi vastiĝadon de HIV/aidoso, malario, tuberkulozo kaj aliaj malsanoj.
7. Certigi daŭreblecon por la naturmedio.
8. Krei globalan partnerecon.

Por sekvi la evoluon de la celoj UN kompilas jarajn raportojn, kie oni listigas la okazintajn tendencojn. El la raportoj oni povas legi, ke la celoj per la nuna rapideco de la evoluo ne estas plene atingotaj ĝis 2015, sed la evoluo estas ĝustadirekta.

Ni esperantistoj ankaŭ havas mision bonigi la mondon, per nia internacio lingvo. Sed eta ŝajnas nia misio, se oni komparas ĝin kun la jarmilceloj de UN. Dum oni en la fonaj dokumentoj de la jarmilceloj rakontas, kiom da homoj devas vivi per jara enspezo malpli ol unu eŭro por tago, kiom da infanoj mortas dum sia unua vivjaro, kiom da homoj suferas pro dumvivaj malsanoj, ni ofertas la ideon, ke ni havas ĉi tian interesan lingvon, kiun oni povas lerni rapide. Mi ne miras, ke la plimulto de idealismaj homoj

havas pli grandajn okupojn por siaj cerboj ol komenci lerni novan lingvon.

Dum pli ol jarcento la esperantista misio jam vivis sen atingi rolon de signifa faktoro en la mondo. Ĉiam ekzistis nur espero, ke iam en estonteco ĉi tiu estos la utila rimedo en internacia agado. Kaj tamen UN kaj multaj aliaj organizoj daŭre faras siajn internaciajn mondbonigajn agadojn sen uzi la internacian helplingvon. Ankaŭ la jarmilcela projekto pason post paso progresas direkten de ĝia plenumiĝo, sen bezoni helpon de Esperanto.

Aliflanke nia afero tamen ankaŭ estas granda afero. En la finna lernejo jam dum jardekoj principe ĉiu devas dum jaroj studi almenaŭ du fremdajn lingvojn. Kaj tamen fakto estas, ke signifa porcio de finnoj reale ne parolas eĉ unu fremdan lingvon. Ŝajnas, ke oni ofte havas la tre optimisman kredon, ke oni povas lerni diversajn lingvojn, kaj tamen evidentiĝas, ke oni nur penas en la studado dum jaroj, kaj fine tamen renkontas la situacion, ke oni ne atingis nivelon de lingvokapablo, kiu sufiĉus por diskuto en la fremda lingvo.

Oni povas ankaŭ kompari la esperantistan mision kun la punkto 2 de la jarmilceloj. Ni en la industriaj landoj pensas jam esti praktike memklaraĵo, ke ĉiu homo scipovas legi. Sed centoj milionoj da homoj ankoraŭ ne povas legi eĉ sian propran lingvon – kaj post lerni tion ili ankoraŭ havus antaŭ si la ceteran paŝon de lerni legi alian lingvon.

*Mikko Mäkitalo*



# KEF – Kultura Esperanto-Festivalo en Helsinko

Kultura Esperanto-Festivalo okazis en Helsinko 16.-23.7. tuj antaŭ la UK en Vilno. Partoprenis ĝin proksimume cent personoj el dudeko da landoj.

La programo ĉi-foje estis vere abunda kaj bunta. Estas malfacile ĉi tie prezenti aŭ eĉ menciigi ĉion kio okazis nek mi volas fari tion. La programon vi ja povas legi en la antaŭaj numeroj de Esperantolehti. Mi nur diras, ke ĉiutage estis programo de mateno ĝis malfruaj noktaj horoj kaj ofte pluraj programoj okazis samtempe.

KEF certe estis unu el la pintaj aranĝoj en Esperantujo. Kvankam mi ne scias kio okazis en la ceteraj mi tamen povas diri ke ĝi estis eĉ pli bona okazo konatiĝi kun esperantokulturo ol ekzemple la universala kongreso, kiun multaj konsideras kiel la ĉefan jaran aranĝon de Esperantujo.

Vere grave por esperantokulturo estas, ke ankaŭ la artistoj havas eblecon renkontiĝi inter si. KEF estis kvazaŭ esperanta Mekkulo, kie la artistoj povis konatiĝi, ŝanĝi spertojn kaj lerni unu de la alia. Tio certe estis fruktodona por nia kulturo. Jam dum KEF eksonis novaj melodioj kaj vekigis novaj ideoj ĉe la artistoj. La vorto per kiu mi karakterizus la ĉi-jaran KEFon estas spontaneco.


Inter la pluraj eksterlandaj gastoj de KEF mi menciis verkistojn **Sten Johansson** el Svedio kaj **Probal Daŝgupta** el Barato. Malofte oni aŭdas sudamerikan muzikon en esperantoaranĝoj, nun **Flávio Fonseca** el Brazilo kaj **Alejandro Cossavella** el Argentino koncertis en KEF kun granda sukceso.

KEF montris, ke ankaŭ inter la finna esperantistaro estas pluraj talentuloj. Malofte ni havas



*JoMo muzikas kun Kim Henriksen.*

eblecon aŭdi la poemojn kaj kantojn de **Anja Karkiainen**, kiu gajnis plurajn premiojn en la belartaj konkursoj de UEA. En KEF ŝi mem deklamis siajn verkojn, aliajn prezentis profesiaj kantistoj kun la akompano de **Vesa Pölkki**. **Liisa Viinanen** preparis por KEF tute novan operacon, kiun ŝi mem prezentis. La publiko estis ravita. Pri la kantotradukoj ankaŭ ĉi tie respondis Anja Karkiainen. Malmultaj finnoj scias, ke **Timo Väänänen**, unu el niaj plej konataj kanteleludistoj, estas ankaŭ esperantisto. Liaj prezentaĵoj montris, kiom multflanka estas tiu malnova instrumento. **Dolchamar** ludis en sia ▷



nuna konsisto ĝojigante la vesperojn kaj ricevis varmajn aplaŭdojn de la publiko.

KEF videblis ne nur en Kalliola kaj la stratoj de Helsinko sed ankaŭ en multaj finnaj amaskomunikiloj. Tutlandaj televid- ja radioprogramoj (Aamu-TV, Yle Radio 1, Radio Vega) prezentis ĝin kaj esperanton al la tuta lando. Eĉ pli da spaco al ĝi donis lokaj komunikiloj kiel Ylen aikainen, Helsingin Sanomat, Metro, Hufvuds-tadsbladet.

La opinioj de la partoprenintoj kaj reeĥoj en la finnaj amaskomunikiloj estis tre pozitivaj. Ĉu ĉio do estis sukcesa? Plejparte jes, tamen oni devas noti, ke centoj da partoprenantoj en tiom altkvalita, eĉ unika aranĝo en Esperantujo, estas malmulte. Aparte rimarkebla estis la malĉeesto de finnoj. Kelkaj partoprenintoj eĉ demandis, ĉu ne plu estas esperantisto en Finnlando.

Kiajn konkludojn tiri el ĉio ĉi? Certe profitis la artistoj mem pro la multaj kontaktoj inter ili. Eble tio estis eĉ pli grava ol amasa publiko. Profitis ankaŭ esperanto en Finnlando, ĉar estas malfacile imagi, kiamaniere oni povus havi pli la pozitiva atento al ĝi en niaj amaskomunikiloj. Eĉ finance ĝi ne estis malsukcesa, tamen ne sen grava kontribuo de Fondumo Esperanto.

Pliajn fotojn vi povas vidi en la festivala retejo [www.esperanto.fi/kef2005](http://www.esperanto.fi/kef2005).

*Sakari Kauppinen*

## Universala Kongreso 100 jaroj post la unua

Se oni en KEF povis demandi, ĉu ne plu ekzistas esperantistoj en Finnlando, male okazis en UK: Nia malgranda nacio kun siaj 68 UK-partoprenantoj estis en la statistiko de la kongresa libro la naŭe plej multnombra lando. Notinde, ke ni superis i.a. Svedion, kaj ankaŭ tiom grandajn kaj disde Vilnius ne tre distancajn landojn kiel Britio, Ĉeĥio, Hungario kaj Ukrainio. Grandparte danko pro la finna multnombroco nature apartenas al la busa karavano de EAF, kiun plejparto de la finnaj partoprenintoj uzis.

Antaŭjuĝojn pri tre silentaj finnoj rompis Jorma Ahomäki en sia kontribuo al la tradicia evento de diverslandaj salutoj ĉe la inaŭguro de la kongreso, ĉar li elbuŝigis pli longan saluton ol averaĝa salutanto. Al distingo de finnoj kontribuis ankaŭ la Komitato de UEA, kiu elektis ok novajn honorajn membrojn, kaj unu el ili estas nia eksa ĉefdelegito Heta Kesälä. Malpli bonaj novaĵoj tamen rakontis, ke Heta devis pro sia sanstato el la kongreso iri en malsanulejon.

Entute la nombro de partoprenintoj atingis iom super 2300, kio signifis iom pli grandan kongreson ol averaĝe, kiel atendinde pri kongreso okazanta en tiom centra eŭropa loko kiom Vilnius.

Principe la okazo cent jarojn post la unua UK signifis jubilean kongreson. Eble tamen oni pli reale jubileis tion jam en Boulogne-sur-Mer printempe. Pli la etoson laŭ mia percepto efektis la situo, ĉar malofte la UK povas okazi geografie tiom proksime al la naskiĝlokoj de Esperanto – la unuan fojon ĝi nun okazis en Litovio. Zamenhof ja dum la eldono de la unua libro loĝis en Litovio – ne tamen en Vilnius, sed en Kaunas. Al tio aludis la prezidento de Litovio Valdas Adamkus en sia mesaĝo al la inaŭguro de

*La Akademio de Esperanto respondis demandojn de la publiko, ĉi tie buŝe de Brian Moon. Maldekstre sidas la prezidanto de la akademio Geraldo Mattos kaj dekstraflanke Amri Wandel kaj Boris Kolker.*



la kongreso, kaj ankaŭ artikoloj en la kongresa libro.


Iom onin povas naŭzi, se iu nacio volas aparte de aliaj nacioj senti sin hejmlando de Esperanto, ĉar la ideo de Esperanto ja estas esti neniel propraĵo de iu nacio. Bonŝanco – kaj ĉu eble eĉ nepra kondiĉo? – por Esperanto tamen estas, ke ĝia iniciatinto estis tiom kosmopolito, poligloto kaj loĝanto de etne bunta regiono, ke almenaŭ kvar nacioj povas tute juste senti sin la hejmo de Esperanto. La litovoj rajtu fiere konservi kaj

rememori sian parton de la origino de la internacia lingvo.

Kiom mi per preskaŭ ne ekzistanta antaŭa partopreno en Universala Kongreso povas taksii, la ĉi-jara fluis laŭ la tradiciaj linioj sen drastaj specialaĵoj. Koncertoj ofertis amuzigon (krom unu, kies freneze roka bando timigis plejparton de la publiko for antaŭ ol la koncerto eĉ komenciĝis), prelegoj klerigon, ekskursoj konatiĝon kun la lando – kaj la cetera umado en la kongres-ejo diverslandajn konatiĝojn. ▷



*La inaŭguro de la kongreso laŭ la kutimaj tradiciaj konvencioj.*



Mian ĉefredaktoran kleron mi povis evoluigi per sekvi kunsidon de redaktantoj de Esperantaj gazetoj. Konstateblis, ke niaj klopodoj pri aperigo de Esperanta Finnlando per hobiaj fortoj de malgranda asocio ne multe diversas de la situacioj de aliaj. Daŭra regula aperigo, zorgo pri aktualeco de informoj, uzo de limigitaj monrimedoj por presado, kaj nuntempe speciale racia ekvilibro inter uzo de interretaj informkanaloj kaj la papera gazeto, tiuj estas komunaj cerbopenoj de la gazetfarantoj.

*Mikko Mäkitalo*

*La kongresejo-hotelo inter aliaj altaj modernaj konstruaĵoj situis proksime de la antikva urbocentro de Vilnius, ĉe la rivero Nemunas.*

*Daniel Xavier Haddad (videbla sidanta en blanka ĉemizo malantaŭ la homamaso) iĝis post sia koncerto "atakata" de siaj ŝatantoj.*



## IKBE-71: Moderna lernomaterialo kaj nova sango

Modernigo de esperanta lernomaterialo estis la ĉefa temo de la internacia kongreso de blindaj esperantistoj (la 71-a IKBE) okazinta en Vilno en la komenco de aŭgusto. La unusemajna kongreso allogis 90 partoprenantojn el 18 landoj, el Finnlando 9. La plej foraj partoprenantoj alvenis el Japanio, kaj ilia grupo de 12 membroj estis la plej granda. La litova kvinkapa dekkelk-jara knabina grupeto donis fidon al la uzo de esperanto ankaŭ en la estonteco.

Ĉar en Litovio ne ekzistas organizita esperanto-movado, la Ĝenerala Asembleo de LIBE (Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj) okazinta en Beogrado 2004 petis Arvo Karvinen funkciigi la preparlaborojn por la blindula kon-

greso en Vilno. Li ankaŭ starigis studgrupojn de esperanto en blindullernejoj en Vilno kaj Tarto, kaj Steleto helpis pri havigo de lernomaterialo.

La Litova Esperanto-Asocio kaj blindul-asocio kunhelpis, ke blindula kongreso okazis en Vilno tuj post la Universala Kongreso de Esperanto. S-ro Nikitas, vicprezidanto de blindul-asocio peris al la kongreso salutojn de prezidanto Osvaldas Petrauskas. La prezidanto de Litova Esperanto-Asocio Povilas Jegorovas parolis en la inaŭguro de IKBE. D-ro Jukka Pietiläinen ĉeestis la interkonan vesperon kaj prezentis sian laboron kiel speciala komisiito pri informado de la estraro de la Universala Esperanto-Asocio (UEA).

Dum la tuta 20-a jarcento esperanto estis vojo al internacieco. La unua internacia kongreso de blindaj esperantistoj okazis en Prago 1921. La ĉisomera kongreso en Vilno estis la 71-a kongreso. Finnaj blinduloj aranĝis kongreson tri fojojn: en 1922, 1969 kaj 1995.

### Novaj projektoj kaj fortigo de la pozicio de esperanto

La kongresan temon enkondukis Arvo Karvinen kaj Antun Kovac el Kroatio. Por modernigi la maljunigantan esperantan lernomaterialon por

*Post esperantokongresoj en Vilno la japana delegacio konatiĝis kun la servoj de la blindulcentro Iris en Helsinko. Kazuko Kikusima (Krizantemo) prezentis japanajn kimonojn en Iris kun interpretado de Arvo Karvinen. Kelkaj ĉeestantoj eĉ provis ilin. Krizantemo vestas Katri Sahramaa kaj Jarkko Lauri atendas, ke Terumi Honda vestas lin en somera kimono.*



internacia uzo la kongreso decidis starigi laborgrupon. Kiel prezidanto estis elektita instruisto de matematiko Anatolij Masenko el Kislovodsk. Li kunvokos specialistojn pri instruado kaj komunikado kiel membrojn de laborgrupo.

Prezidanto de UEA Renato Corsetti konstatis en sia salutparolo sendita al la kongreso, ke la blindula kongreso pritraktas tute nuntempan problemon. "Ni devas daŭre modernigi niajn lernomaterialojn kaj teknikojn kaj samtempe adapti ilin por homoj de ĉiuj generacioj. Mi estas aparte interesata pri la konkludoj de via kongreso."

La plej aŭtoritata preleganto de la kongreso estis Otto Prytz, profesoro de la hispana lingvo en la universitato en Oslo kaj membro de Akademio de Esperanto. La Akademio konservas kaj protektas la lingvon esperanto laŭ ĝia fundamento kaj kontrolas ĝian evoluon, esploras ĉiajn lingvajn demandojn, kiuj koncernas esperanton, kritikis verkojn el lingva vidpunkto kaj defendas esperanton kontraŭ ĉiaj konkurencoj.

Attila Varró, ĉefredaktoro de Esperanta Ligilo ricevis laŭdojn pro la artikolserio pri la centjara historio de Ligilo kaj esperantomovado ekde la unua kongreso en 1905 en Francio, Boulogne-sur-Mer. En sia prelego Attila Varró konsilis

i.a. kiel uzi komputilon en lernado de esperanto kaj kiel trovi aliron al vortaroj en reto.

Unu temo de diskutadoj estis ĉeesto de esperanto en internacia blindulmovado i.a. en eŭropa blindul-unio (EBU). Dum pritraktado de ĉi tiu afero oni aŭdis la pensojn de ĝenerala sekretario Pedro Zurita, en la internacia blindulmovado merithava personeco. Naciaj organizaĵoj devus kunhelpi tiel, ke esperanto-asocio estu membro i.a. de eŭropa blindul-unio. "La problemo de komunikado internacia ankoraŭ ekzistas. Tiurilate esperanto povos ludi gravan solvan helpan rolon."

La Ĝenerala Asembleo de LIBE elektis novan prezidanton kiel posteulon de s-ro Theodor Speckmann, kiu prezidis 13 jarojn. Laŭ la iniciato de nova prezidanto, bibliotekestrino Nedeljka Lozajic (1956) el Belgrado oni decidis modifi la ĉiujarajn kongresojn aranĝante proprajn programerojn al la junularo.

La sekvonta internacia kongreso de blindaj esperantistoj okazos samtempe kun la Universala Kongreso de Esperanto en Florenco 29.7.-5.8. 2006.

*Ritva Sabelli*



*Eila Karvinen kaj Synnöve Mynttinen (apenaŭ videblaj) admiras pupon kaj Hilikka Vartio montras, kiel larĝa la maniko estas.*



## Aŭtunaj Tagoj per nordia kunlaboro

Okazigo de la Aŭtunaj Tagoj en formo de eksterlanda ekskurso kompreneble ne povis logi tiom grandan aron da finnoj partopreni, kiom kutimis kolektiĝi ene de Finnlando, sed preskaŭ 30 da ni tamen transiris la maron en la najbarlandon. Kun preskaŭ sama kvanto da svedoj kaj du norvegoj la evento tamen atingis la grandecojn tipan por la AT.

La nordia kunlaboro montris promesplenajn perspektivojn. Kunesto de la Esperanto-movadaj eminentuloj el la tri nordiaj landoj ebligis interesajn diskutojn kaj daŭrigo por simila kunlaboro atendindas. La Esperantodomo en Lesjöfors ja ofertis unike bonkvalitan ĉirkaŭon por la evento – tian oni apenaŭ havas aliloke en Nordio, apenaŭ multajn en la tuta Eŭropo.

Antaŭ la fino de la evento iĝis diskonigita morna novaĵo: antaŭ kelkaj tagoj mortis Franko Luin, eksa prezidanto de la Sveda Esperanto-Federacio.

Oni povis konstati, ke la situacioj de la Esperanto-asocioj en la tri landoj plejparte similas.

La membrokvantoj estas en sama grandeklaso kaj la tendenco estas malkresko. La jarcento da ekzisto de Esperanto-movado vidis ŝanĝiĝon de la mondo el industria socio al posta, kiun oni povas nomi komunikada socio. La organizoj kaj movadoj devus transpreni novajn pensmanierojn. Ni esperantistoj ne tre malbone utiligis inventaĵojn de la komunikada socio, sed ni apenaŭ ankaŭ estis la plej progresaj adoptantoj de la novaj rimedoj.

Inter cerbumado pri defioj de la ŝanĝiĝanta mondo ni ankaŭ lernis pri pasinteco. Al tio apartenas ekzisto de la finna lingvo en la regiono, kie Lesjöfors situas. Granda nombro da finnoj en la 17-a jarcento transloĝiĝis en arbarajn partojn de Svedio por utiligi la tiean terenon per sia brulkultivado, t.e. kultivado de greno en cindro de bruligita arbaro. La finna lingvo ekzistis tie ankoraŭ en la frua parto de la 20-a jarcento, sed post tio la finnlingva minoritato jam tute svedlingviĝis kaj postlasis nur kelkajn finnajn loknomojn por esti sia spuro. ▷



*La plej malnovaj domoj apud la ferindustrejo Engelsberg, mondheredaĵa objekto de Unesko, aĝas kelkajn centojn da jaroj, kvankam incendioj, kiel kutimas en lignaj urbopartoj, intertempe detruis multon.*





**Lars Forsman (konata pro la Eo-lerno-libro EPoGo) bonvenigis kaj rakontis pri la Sveda Esperanto-instituto.**

Alia parte jam pasinta trajto de la regiono estas ferindustrio, kio kaŭzis naskiĝon de la vilaĝo Lesjöfors kaj de multaj aliaj vilaĝoj kaj urbetoj en nordokcidenta Svedio. Iam estis kelkaj miloj da ferindustriaj laborlokoj en Lesjöfors, nuntempe restas nur iom pli ol 300. Loĝantojn Lesjöfors havas nun 2000, pro malapero de la laborlokoj malplimultiĝas ankaŭ la loĝantaro.

Muzikan amuzon en la vesperojn formis plimalpli spontana asembleo de la ĉe-estantoj kun violonoj, akordiono kaj kantado. Materialon por tio provizis Martin Strid, kiu jam longtempe kolektis Esperantajn tradukojn de nordiaj kantoj (vidu intervjuon sube), kaj Anja Karkiainen per siaj propraj kantotradukoj. Cerbojn oni gimnastikigis per kvizoj, el kiuj mi aplikigas ĉi tien unu demandon: ĝustigu per unu kompletiga streko la suban ekvacion:  $1\ 1\ 1\ 0 = 9$

Mikko Mäkitalo

## Kantokolektanto kaj gvidanto de Esperanto-doma agado

Martin Strid prezentis al la partoprenintoj de la AT amason da kantoj. Lia granda intereso, jam dum 15 jaroj, estas kolekti nordiajn kantojn en Esperantaj tradukoj.

Martin: *Mi transprenis la laboron de iu, kiu komencis ĝin antaŭ mi (kaj kiu volas resti anonima). Enskribitaj en la kolekto estas ĉ. 500 kantoj, ankoraŭ ne enskribitaj eble 100 atendas sur mia skribotablo. Plej multaj estas svedaj, sed el ĉiu nordia lando estas. Minoritatlingvaj estas malmultaj. Grenlandajn mi havas kelkajn, sed ili estas vere nur poemoj. Krome mi havas kelkajn kantojn en forgesiĝantaj dialektoj.*

Li ankaŭ mem tradukis iujn kantojn.

Martin: *Mi malkovris, ke estas tre interesa tasko traduki. La kvalitoj de la tradukoj estas variaj. Mi trovis manieron taksu kvaliton de tradukoj. Oni rigardas kvin vidpunktojn, mi nomas ĝin FLORE-taksado. F = facile fluas en fundamenta Esperanto. L = lingve lertas. O = obeas*

*la originalon laŭ enhavo. R = ritme kaj rime belas. E = efikas etose kiel la originalo. La tradukanto povas elekti, kiun vidpunkton el tiuj oni lasas fuŝi aŭ fuŝeti.*

Se vi tradukis kantojn kaj volas diskonigi ilin per la kolekto, sendu al [martin.strid@gmail.com](mailto:martin.strid@gmail.com)

Martin estas ankaŭ prezidanto de la Esperanto-domo, antaŭ unu jaro elektita en tiun postenon. La domo estas ne nur loko por Esperanto, sed ankaŭ junulargastejo, ano de Sveda Turisma Federacio STF.

Martin: *Ni estas ekonomia kooperativo laŭ la sveda leĝo pri tio. T.e. ni havas statuton registritan oficiale kaj oni membriĝas per aĉeti parton de la kooperativo. Unu parto kostas 100 kronojn kaj oni povas aĉeti kiom ajn partojn. La loko funkcias tute per idealisma laboro. Ni tre dependas de nia ĉi tie ĉiam loĝanta persono Lennart Svensson, kiu zorgas pri la ejo kaj manĝigas la gastojn.*



***Martin Strid en la vestiblo de la Esperantodomo.***

La Esperantodomo estas por eksterlandaj Esperantistoj konata pro okazigo de Kultura Esperanto-Festivalo tie du fojojn en la 90-aj jaroj kaj la junulara kongreso IJK en 2003. Pri okazigo de diversaj eventoj tie Martin diras: *Ni volus havi pli ofte. Kutime ni havas someran kurson post la somermeza festo. Aŭtune ni havas jar-kunvenon. Ni ankaŭ havas ekzemple familian kunvenon ĉe novjaro, tiam oni povas veni por skiado en la ĉirkaŭaj arbaroj.*

La estontecon Martin vidas fidoplene: *Mi opinias, ke sur la kondiĉoj de la daŭra idealisma laboro la ekzisto estas stabila, kaj la estraro havas ideojn kaj planojn pri la evoluo de la domo. Kaj multigo de renkontiĝoj, kvankam tio ankoraŭ ne realiĝis.*

*Mikko Mäkitalo*

## Peto pri kontribuo

Esperanto-Gården estas ekonomia kooperativo fondita en 1997 por hejmi al movadaj kunvenoj. Ĝi samtempe estas junulara gastejo ĉe Sveda turisma asocio (STF), sen kio ĝi rapide bankrotus. Ĝi ne funkcius sen multa senpaga laboro de aro da samideanoj.

La faritaj investoj en EG estas gravaj kaj valoraj, ĉefe tiu de varmigo per rokvarmo el subgrundo. Nun ni venis al punkto kiam necesas nova investo por daŭrigi la bonstaton de la gastejo. Sukcesa gastigado dependas je haveblo de littukoj kaj ebleco lavi ŝtofojn kaj vestaĵojn. EG nepre bezonas novan maŝinaron por lavi, sekigi. Alie la fortoj de niaj volontuloj elĉerpiĝos vane.

Tial ni petas vin zorge pripensi, kiomgrade vi povas kontribui. Ĉu persone, ĉu per ia fonduso kie vi anas. Ĉu per donacoj, ĉu per aĉeti membropartojn (po 100 svedaj kronoj aŭ 11 eŭroj) en la kooperativo EG. (La ekonomia stato de EG ne permesas nin signi novajn pruntojn).

La investo estas urĝa. La nova lavmaŝinaro estu prete instalita antaŭ Sveda Ralio februare en 2006. Tranoktaj gastoj dum tiu ralio estas nia plej grava enspezo ĉiujara.

Via kontribuo estas tre bonvena al UEA-konto lesj-q. Ni petas vin krome pludoni, se eblas, ĉi tiun peton al konatoj kiuj povus ankaŭ kontribui.

## Bön om bidrag

Esperanto-Gården ek. för. bildades 1997 som ett hem för vår rörelse. Den är samtidigt ett STF vandrarhem, vilket är nödvändigt för att det ska gå ihop. Den skulle aldrig fungera utan ett stort ideellt arbete av ett antal personer.

Viktiga investeringar har gjorts, främst installation av bergvärme. Vi har nu nått en punkt där en ny investering behövs för att EG ska fortsätta att hårbärgera gäster. EG behöver få nya maskiner för tvätt, tork och mangling. I annat fall kommer våra frivilligas krafter att ta slut.

Därför ber vi dig tänka över, hur mycket du kan bidra med, personligen eller genom någon

fond. Med regelrätta bidrag eller genom att köpa andelar (à 11 euro) i den ekonomiska föreningen. (EG:s ekonomi tillåter inte nya lån). Investeringen brådskar för att vara färdig före Svenska Rallyt i februari 2006, EG:s viktigaste årliga inkomstkälla. Ditt bidrag är välkommet till UEA-konto lesj-q (via Finlands Esperantoförbund, se s. 2).

## Tukipyöntö

Esperanto-Gården on Ruotsin esperantoliikkeen omistama enimmäkseen vapaaehtoistyöllä ylläpidettävä talo, jossa toimii samalla hostelli. Talossa on investoitu mm. maalämpöön, mutta nyt tarvitaan uusia investointeja pesukoneisiin, että majoitustoiminta pysyisi mahdollisena.

Pyydämme sinua harkitsemaan, kuinka paljon voisit antaa tukeasi, henkilökohtaisesti tai jonkin säätiön kautta, lahjoittamalla tai ostamalla osuuden (11 euroa/kpl). (Uusien lainojen ottoon EG:llä ei ole mahdollisuutta.)

Laitehankinta olisi kiireellisesti saatava helmikuuhun 2006 mennessä, jolloin tapahtuu EG:n tärkeimmän vuosittaisen tulonlähteen muodostava Ruotsin ralli. Tuki on tervetullut UEA-tilille lesj-q (Suomen Esperantoliitto välittää maksun sinne, ks. sivu 2).

*Martin Strid,  
prezidanto/ordförande  
(EG:n puheenjohtaja; yhteydenotot  
ruotsiksi tai esperantoksi)  
tel. +46-243-124 80,  
+46-70-315 261 5*

## ✉ Korespondi deziras

Kun virino 40-60 -jara, kiu deziras permane korespondi, volas kontakton belga virino:

Claudine Joncret, 35 Rue Jeanne, 6560 Solresur-Sambre, Belgio.

Temoj: Florĝardeno, kuro, trikaĵoj, muziko, turismo.

## IJK laŭtis en Zakopane

La Internacia Junulara Kongreso ĉi tiun fojon kolektis la tipan kelkcentan partoprenantaron en montaran urbon Zakopane proksime la sudan limon de Pollando. Finnoj ĉi tiun fojon estis tuta aro da ok personoj.

La esperantistoj ŝajne disaŭdigis sin rimarkinde bone, ĉar okazis, ke la polico devis veni por kvietigi ilin. En la fono de la okazo estis, ke juristo loĝanta en la najbaraĵo certigis, ke la kongreso strikte obeu la permesitajn kondiĉojn. Oni devis peni por kredi, ke ekzistis vera minaco, ke la polico tute ĉesigos la kongreson. Pro tio necesis zorgeme fermi la diskejajn fenestrojn, por ke La Bamba ne pelu la najbaran juriston danci la lastajn paŝojn de la kongreso.

La vetero malebligis al la esperantistoj disvidigi sin por eksteruloj tiom, kiom estis planita. La plano estis, ke kongresa programero “kultura kaj lingva festivalo” okazu sur centra placo de



*Zakopane surstrate. (foto: A. Sochacki)*

*Ankaŭ Finnlando sin prezentis en la kultura kaj lingva festivalo per finnlingva kantado. Eĉ alilandanoj aliĝis en la kantadon kaj konstatis, ke prononco de la finna lingvo estas facile tuj lernebla. (foto: Andreo Sochacki)*



la urbocentro. La pluvo tamen devigis ĝin okazi ĉe la kongresejo, kie apenaŭ eksteruloj povis trafi ĝin.


Margareta Handzlik prelegis pri sia laboro en la Eŭropa Parlamento. Ŝi ja scipovas Esperanton, sed tiom sentas sin necerta en tio, ke ŝi pa-

rolis la prelegon en la pola kaj ŝia edzo Georgo tradukis. En sia parlamenta laboro Margareta uzas plejparte la polan kaj la anglan.

En la plenaj kunsidoj de la Eŭropa Parlamento ĉiu parlamentano parolas sian nacian lingvon kaj tradukistoj tradukas ĉion al ĉiuj aliaj 20 EU-lingvoj. Tio tamen validas nur por la plenaj kunsidoj. En komisionoj kaj laborgrupoj oni laboras sen tradukado kaj plej ofte ĉiuj tie parolas en la angla.

Por aliaj parlamentanoj Margareta Handzlik informis pri Esperanto, sed ne tuj celante al ne-realisme altaj celoj. Oni ne povas tuj strebi al ekuzo de Esperanto, ĉar unue oni kutime devas ĝustigi la plej malĝustajn miskomprenojn pri Esperanto, ekzemple, ke la celo de esperantistoj estus fari ĝin la sola oficiala lingvo de EU.

*Mikko Mäkitalo*



*Samir Ribic en kunsido de BEMI (biciklista movado) en la IJK prelegis pri trajtoj de Bosnio-Hercegovino, kie okazos la sekvajara IJK, el vidpunkto de bicikla karavano. (foto: mm)*

## Fabelkonkursrezultoj 2005

Kategorio A:

1. La donaco: Anna Bolognesi, Italio
2. Hundidetoj unue ekskursis: Denisa Foglova, Ĉeĥio

Kategorio B:

1. La atako de la drako: Giuseppe Bolognesi, Italio
2. La eta sireno: Federica Guerra, Italio
3. La kankro kaj la leono: Damir Slepnev, Rusio
4. Familio Urtika: Mihaela Slavickova, Ĉeĥio

Kategorio C:

1. Koro de feino: Chiara Bolognesi, Italio
2. Fabelo pri maljuna hundo: Nicola Janouskova, Ĉeĥio
3. Malobeema klaso: Karolina Silarova, Ĉeĥio
4. Pluvombrelo: Miriam Merkurdova, Ĉeĥio
5. La urso Fik: Aneta Cisarova

Kategorio Grupoj:

1. Princino Liliana kaj la blanka ĉevalo: Alice Larue, Belgio, Aniko Hegedus, Hungario, Gretel Schumann, Francio

La ĉefan premion Fabelo Internacio 2005 gajnis la grupa konkursaĵo 'Princino Liliana kaj la blanka ĉevalo'.

La premiofesto okazos en 18-a de oktobro 2005 en Taivalkoski. Gratulon al ĉiuj partoprenintoj!

*Aini Vääräniemi*

## UEA invitas prelegi en la Florenca IKU-sesio

Dum la 91-a UK en Florenco okazos la 59-a sesio de Internacia Kongresa Universitato, kie rajtas lekcii universitataj profesoroj kaj personoj kun simila kvalifiko. UEA invitas prezenti proponojn pri prelegoj al la sekretario de la IKU-komisiono, prof. dr-o Christer Kiselman, <kiselman@math.uu.se>, Poŝtkesto 480, SE-

751 06 Uppsala, Svedio, plej laste 2006-01-31.

Propono enhavu (1) ĉ. duonpaĝan resumon de la prelego en Esperanto, (2) ĉ. duonpaĝan biografieton kun persona bibliografio kaj (3) foton taŭgan por publikigo. Aparte bonvenaj estos prelegoj rilataj al la kongresa temo, kiu estas "Lingvoj, kulturoj kaj edukado al daŭrigebla evoluo". La samo validas por junaj kandidatoj kaj tiuj kiuj ankoraŭ ne prelegis en iu IKU.

Ĉiu preleganto devas esti kongresano kaj mem zorgi pri sia aliĝo. Prelego estos rekompencita per modesta honorario. Pliaj detaloj troviĝas en la IKU regularo, rete [http://uea.org/dokumentoj/iku\\_regularo.html](http://uea.org/dokumentoj/iku_regularo.html)

*(el komuniko de UEA koncizigis mm)*

## Havigu sciojn pri Kubo en Esperanto!

La Kuba Informa Agentejo komencas oferti al vi tagan informservon pri Kubo en lingvo Esperanto.

Tio plenumas duoblan celon, nome informi pri la kuba realo kaj montri, ke la lingvo Esperanto estas utila en la praktiko.

*Kuba Informa Agentejo*

*Vi povas kontakti al <esperanti@ain.cu>*

## Jubileo de CO en la Malferma Tago

Antaŭ 50 jaroj, en novembro 1955, la Centra Oficejo de UEA translokiĝis el la apud-Londona vilaĝo Heronsgate al la havenmetropolo Roterdamo. Tiun datrevenon atentos la venonta Malferma Tago de la CO, kiu okazos sabaton, la 26-an de novembro, de la 10-a ĝis la 17-a horo. Historiisto Ziko Sikosek prilumos tiam en sia prelego la historion de la ĉefaj sidejoj de la monda organizaĵo ekde Ĝenevo ĝis Roterdamo. Li ankaŭ intervjuos iamajn oficistojn, interalie John Rapley, kiu estis la lasta direktoro en la oficejo en Heronsgate, kaj Victor Sadler, kiu

dum du jardekoj laboris en la Roterdama oficejo. Apud historiaj trarigardoj oni ankaŭ ne forgesos la aktualajn taskojn kaj defiojn de la Asocio, pri kiuj parolos prezidanto Renato Corsetti.

*(el komuniko de UEA prenis mm)*

### UEA pli granda ol en 2004

Ok monatoj sufiĉis al UEA por superi la pasintjaran nombron de individuaj membroj. Fine de aŭgusto 2005 estis jam registritaj 5858 membroj, t.e. je du membroj pli multe ol en la tuta antaŭa jaro. La nombro de individuaj membroj kreskas por la tria sinsekva jaro: En 2003 per unu membro, pasintjare jam per 142.

Aparte rimarkindas, ke la nombro de junaj individuaj membroj kreskas rapide. En 2004 TEJO nombris 436 individuajn membrojn, sed en aŭgusto ĉi-jare jam 457. Kun la membriĝoj dum IJK la nombro superos 500. La plimultiĝo kronas la specialan atenton, kiun la antaŭa ĝenerala sekretario de TEJO, Aleks Kadar, donis al membrovarbado.

*(el komuniko de UEA koncizigis mm)*

### Agado en Tampere

Klubvesperoj estas en la klubejo NESTO, Satakunnankatu 30 C 6, lunde je la 17a. La enirejaj pordoj fermiĝas aŭtomate precize je la 18a.

7.11. Novembra vespero. Lingvoekzercoj.

21.11. Elektokunveno. Oni faras agadprogramon de Antaŭen por la jaro 2006 kaj elektos personojn kiuj realigos la planon.

12.12. Decembra vespero. Juleto kaj Zamenhof-vespero.

Pensiula Esperanto-grupo de ETY daŭre kunvenas ankaŭ dum vintro en NESTO, ĉiun duan ĵaŭdon ekde 22.9. je la 11.30–13.00.

Esperanto-kurssi alkajille, jos vähintään 3 halukasta löytyy, NESTOssa torstaisin klo 18.00 -19.00. Opettaa Sylvia Hämäläinen, puh. (03) 3463 493.

*(el Vekilo kompilis mm)*

### IS en Xanten

La 49a Internacia Seminario de la Germana Esperanto-Junularo okazos 27.12.2005–3.1.2006 en Xanten, en plej okcidenta Germanio proksime landlimon de Nederlando. La temo estos religioj, kulturoj kaj vivfilozofioj en la 21a jarcento. Kotizoj inkluzivantaj loĝadon kaj manĝojn varias depende de la aĝo inter 100 kaj 270 eŭroj; por memzorgantoj (sen manĝoj) inter 30 kaj 140 eŭroj. Pliaj informoj interrete en [www.internacia-seminario.de](http://www.internacia-seminario.de), papera informilo aliĝilo ricevebla de la ĉefredaktoro.

*(mm)*

### ”Vojaĝo en Esperanto-lando” pleja en UK

La plej populara Esperanta libro de la lastaj jaroj, ”Vojaĝo en Esperanto-lando” de Boris Kolker, estis la pinta furoraĵo ankaŭ en la kongresa libroservo de la UK, kie ĝia ĵus aperinta tria eldono vendiĝis en 96 ekzempleroj. Bonan debiton ĝuis ankaŭ ”Sed homoj kun homoj” de Ziko Sikosek pri la 100-jara historio de Universalaj Kongresoj, 66 ekzempleroj. La trian lokon atingis la tradicia kajero kun la prelegoj de la Internacia Kongresa Universitato, 62. La Libro-servo vendis en la UK varojn por suma valoro de pli ol 32000 eŭroj.

*(el komuniko de UEA koncizigis mm)*

---

### ✉ Korespondi deziras

Mi volas korespondi kun samideano aŭ samideanino. Mi estas 70-jara vidvino, kaj miaj intereso estas bestoj (precipe hundoj kaj katoj), fremdaj landoj, legado kaj klasika muziko.

Patricia N. Wigh, 41 Sutter St., #1843, San Francisco, CA 94104, U.S.A. (Usono)

## *Esperantohistorio en la plej malnova urbo de Finnlando*

# **Vintraj Tagoj en Turku 25.-26.3.2006**

Post sukcesaj aŭtunaj tagoj en Svedio estas agrable bonvenigi vin ĉiujn venontmarte al Turku. Eble ni ricevos vizitantojn el nia okcidenta najbarlando.

La aranĝo okazos en Aurala-instituto, kie ni dum kelkaj jaroj havis esperantokursojn kunlabore kun la civitanta instituto. Laŭ nunaj planoj estos i.a. du interesaj prelegoj: Martti Vihanto rakontos pri esperanto-poŝtmarkoj kaj pri infanaj esperantospertoj, Väinö Havu prelegos pri haŭtkuracista temo. Vespere estos festeto kun komuna manĝaĵo. Noktemuloj povos ankoraŭ viziti observatorion por vidi la stelojn kune

kun Mikko Mäkitalo. Dimanĉe post la jarkunveno ni faros rondveturon kaj vidos sub gvidado de Jorma Ahomäki la ĉefajn esperantolokojn de la urbo kaj aŭdos pri gravaj personoj kiuj antaŭenigis la aferon en la regiono. Fine ni havos komunan lunĉon.

Atendos denove interesa semajnfino kun bunta programo. Pli detalaj informoj aperos en la sekva numero de EF, sed notu jam nun la tagojn. Laŭ eblecoj venu jam vendrede.

*Bonvenigas vin  
kaj EST (Esperanto-societo en Turku)  
kaj EAF (Esperanto-Asocio de Finnlando)*

## *Esperantohistoriaa Suomen vanhimmassa kaupungissa*

# **Talvipäivät Turussa 25.-26.3.2006**

Hyvin onnistuneiden syyspäivien jälkeen on mukava toivottaa teidät kaikki tervetulleiksi Turkuun. Ehkä saamme mukaan vieraita myös läntisestä naapurimaastamme.

Turun päivät järjestetään Auralan kansalaisopiston tiloissa. Olemme jo useana vuonna opettaneet siellä esperantoa hyvässä yhteistyössä opiston kanssa. Ohjelmassa on tämän hetkisten suunnitelmien mukaan mm. kaksi mielenkiintoista luentoa: Martti Vihanto on lupautumaan kertomaan esperantopostimerkeistä sekä lapsuutensa esperantokokemuksista. Väinö Havu pitää ihotauteihin liittyvän esitelmän. Lauantaina on Auralassa ohjelmallinen ilta ja yhteinen illallinen. Yökyöpelit voivat sitten sään salliessa lähteä Mikko Mäkitalon kanssa katsomaan täh-

tiä Iso-Heikkilän tähtitornista. Sunnuntaina vuosikokouksen jälkeen tutustumme Jorma Ahomäen opastuksessa Turun merkittäviin esperantopaikkoihin ja -henkilöihin. Käytössämme on oma bussi. Kiertoaajelun jälkeen on ohjelmassa vielä päätöslounas.

Merkitse siis jo heti kalenteriisi tämä ensi vuoden maaliskuinen viikonloppu. Jos ehdit, tule Turkuun jo perjantaina. Tarkempia tietoja päivistä saat joulukuun numerossa.

Tervetuloa Turun talvipäiville!

*EST (Esperanto-societo en Turku/  
Turun Esperanto-yhdistys)  
EAF (Esperanto-Asocio de Finnlando/  
Suomen Esperantoliitto)*



## Estraro kunvenis

La estraro kunvenis en la oficejo la 21-an de aŭgusto (kunveno 7/2005), 12.30-17.40, ĉeestis Ritamäki, Oittinen, Grundström, Huuskonen, Saarinen, Saastamoinen, Vihermä, vicestraranoj Pirinen, Rinta-Karjanmaa, parte la kasisto. La kunsidaj kostoj estas registritaj sub la projekto Al kvalita komunikado. La estraro ĉefe traktis AKK-aferojn.

### Plano pri finnlingva libro

Antaŭ la kunsido la estraro informiĝis pri la plano de Jukka Pietiläinen fari finnlingvan libron pri Esperanto. Ĝi enhavos ĝeneralan pritraktadon de la fenomeno Esperanto, pri ĝia historio kaj evoluo en Finnlando kaj informojn pri la nuna stato de la movado. Pietiläinen ricevis stipendion de FES por la libro-projekto kaj laboras preskaŭ plentempe pri la libro ĝis la fino de tiu ĉi jaro. La libro pretiĝos laŭplane dum 2006.

### Novaj abonkotizoj

La estraro fiksas la abonkotizojn de Esperanto-lehti (EF) por la jaro 2006 sekve (ioma altiĝo de 2005):

- Abonprezo 18,00 e
- Abonprezo por membroj 12,00 e
- Abonprezo por membrasocietoj abonantaj al ĉiuj siaj membroj kaj por ordinaraj FEJO-membroj tra FEJO 10 e

La estraro rekomendas al la membrasocietoj aboni laŭ eblecoj la gazeton al ĉiuj siaj membroj.

### Verŝajne samaj membrokotizoj

La estraro konstatis, ke momente ne antaŭvideblas bezono altigi la membrokotizojn por 2006 (nunaj kotizoj: 18 e/individua membro, SNR 36 e/membro, 3 e/aligita membro, 1,50 e FEJO/ELFI/Steletto aligita membro).

La estraro informiĝis kaj diskutis pri la nuna financa situacio kaj konstatis, ke necesas utiligi ĉiujn eblecojn por havigi financan subtenon de ekster- kaj enmovadaj fontoj. Unu ebleco estos

petletero al Suomen Kulttuurirahasto.

Esperantolehti ricevis ankaŭ ĉi-jare 1000-eŭran kulturgazetan subvencion de Edukministerio. Membrokotizo por 2005 de UN-societo (YK-liitto) estas pagita (80 eŭroj). Al la domkompanio de Siltasaarenkatu 15 la Asocio pagis dum la somero ekstran pagon de 520 eŭroj por renovigaj laboroj.

La estraro diskutis pri kontaktindaj personoj por trovi novan kasiston kaj verŝajne ankaŭ libroteniston ekde 2006.

La estraro konstatis, ke la dua eldono de lernolibro Egaleco kaj paco de Forsman-Pyhälä baldaŭ elcerpiĝos kaj decidis represi la duan eldonon sensanĝe.

Kelkaj estraranoj renkontiĝis dum UK en Vilno kun F. Veuthey kaj vidis liajn proponojn por leterpaperaj kaj kovertaj logo-simboloj.

Aini Vääräniemi nome de Metsäkylän Kyläseura ry (vilaĝa societo) en Taivalkoski sendis peton pri AKK-financado por informa semajnfino. Konsiderante la grandan informan agadon pri Esperanto en Taivalkoski la estraro decidis aprobi la peton tiel ke ĝis maks. 200 eŭroj estos rekompencitaj laŭ realaj kostoj post ricevo de raporto kaj livero de la dokumentoj uzitaj (ekz. anonco en gazeto, programfolio). Laŭ la AKK-gvidlinioj lige al la aranĝo estu menciita la partopreno en AKK (ekz. en anoncoj kaj informiloj). La estraro ankaŭ volas instigi informadon pri la evento pere de gazetaraj kontaktoj.

Vintraj Tagoj okazos 25.-26.3.2006 en Aurala-instituto, Turku.

Valamo-kurso okazos 3.-7.7.2006, Atilio Orellana Rojas denove pretas instrui. Kleriga semajnfino estas planata la antaŭan semajnfino, eble en Orivesi. Tiam okazu ankaŭ publika prezento de Esperanto kaj eventuale intensa kurso por novuloj.

La estraro konstatis, ke kadre de jubilea jaroraranĝoj indus konatiĝo kun e-klubo kaj -grupoj en la tuta Finnlando ekzemple en formo de vizito. Plej unue la estraro klopodos aranĝi renkontiĝon kun EsperHe en Helsinko. ▷

Oulu-regiono povus esti ebla loko por AT-2006.

La multjara, bona kunlaboro kun la Popola Instituto de Valamo ebligis ĉi-jaran kurson, 4.-8.7.2005 kun minimuma nombro de gelernantoj (5). Vojaĝ- kaj manĝokostoj de Tiina kaj festa vespermanĝo de ambaŭ instruistoj estis pagitaj de EAF (126 e, instruistaj kostoj). Estis senditaj gazetaraj komunikoj al lokaj amaskomunikiloj en regionoj Turku kaj Heinävesi. Rezultigis du radiointervjuoj, Tiina kaj Mohamed en Turku-radio kaj Tiina en radio de Etelä-Savo (ambaŭ lokaj stacioj de YLE), kaj kelkaj artikoloj en lokaj gazetoj. Tio ne portis novajn gelernantojn ĉi-jare, sed estis tamen bona reklamo por la venontjara kurso.

KEF 2005 realiĝis kun ĉ. 100 partoprenantoj kaj 30 artistoj. La aranĝo ricevis grandan publik-econ en diversaj tutlandaj kaj ĉefurbaj amaskomunikiloj, i.a. intervjuon en Aamu-TV mate-na televido, YLE-TV1 kaj raporton en TV-kultuuriutiset (kulturaj novaĵoj). Posta KEF-kunsido okazis 13.8.2005. Financkalkulo ne ankorau pretas.

La karavanon aranĝitan de EAF-sekretario partoprenis entute 47 personoj (46 tien/45 reen). Gazetara komuniko de EAF estis sendita al STT-FNB (Suomen Tietotoimisto-Finska Notis-byrån) kaj al partoprenantoj, kiuj povis uzi ĝin loke. Rezultigis kelkaj artikoloj, i.a. en Lappeenranta kaj en Turku.

Dum la UK la sekretario renkontiĝis kun UEA-estrarano pri Landa kaj regiona agado, sino Maritza Gutiérrez González kaj interkonsentis, ke Esperantolehti estos sendita informe al ŝi. Krome la sekretario promesis aliĝi al retlisto Landa Agado.

EEU-renkontiĝon en UK partoprenis Carola Antskog kaj parte ankaŭ la prezidanto. EEU nun havas novan statuton kaj estas registrita kiel internacia asocio laŭ belga juro.

Post la UK ELFI-representantoj Carola Antskog kaj Sylvia Hämäläinen partoprenis ILEI-kongreson en Kaunas kaj donacis Kalevala-

libron al la Humanisma fakultato de la Vilna Universitato en Kaunas.

Lauri Peltonen, kiu en Maaailma Kylässä-aranĝo renkontis FEJO-deĵorantojn, donacis al EAF siajn Esperantolibrojn, kiujn li pro koincido trovis kaj konservis por ke ni prizorgu ilin: Werner Anttila: Suomi-esperanto sanakirja, G. W. Edlundin kustannusosakeyhtiö, Helsinki 1911, Werner Anttila: Esperanto-suomi sanakirja, G.W. Edlundin kustannusosakeyhtiö, Helsinki 1913, Aug.Th. Lauren & K.J.T. Kuntzi: Esperanton kielioppi sekä esimerkki ja harjoituskirja, Gummerus, Jyväskylä 1908 (kolmas painos), Emilo Gasse: Kurso tutmonda de la lingvo esperanto laŭ la metodo natura, Librairie Hachette, Pariisi 1909, E. Cirikov: En malliberejo (el la rusa lingvo tradukis D-ro Kabe), Librejo esperanto, Moskova 1900-luvun alku (?), L.N.Tolstoj: Kaukaza kaptito (Tradukis F-ino A.N.Sarapova), Librejo esperanto, Moskova 1911, J. Sirjaev (Ivan Malfeliĉulo): Tra la loko ensorcita Librejo Esperanto, Moskova 1913.

Inventario en la kelo kaj subtegmenta ejo de Siltasaarenkatu-oficejo estas farita kaj la tie trovitaj varoj listigitaj (Päivi Saarinen).

La estraro notis informon pri seminario pri multlingveco 1.-5.9.2005 Helsinki-universitato. Partoprenos almenaŭ unu eksterlanda esperantisto. [La evento okazis kaj aperis pluraj gazetaraj artikoloj kie fakuloj diskutis la minacon de la angla lingvo por la universitatnivela lingvaĵo en aliaj lingvoj.]

La prezidanto reprezentos EAF:n en la jubilea festo de Fondumo Esperanto-Säätiö 24.10.2005.

Baltaj Esperanto-Tagoj 2006 okazos 4-8.7.2006 en Saaremaa, Estonio.

Sekva estrara kaj AKK-grupa kunsido okazos en la oficejo de Siltasaarenkatu en Helsinki la 29an de oktobro 2005 aŭ en alia taŭga tempo se eblos tion kunligi kun la planoj de EsperHe kaj/aŭ JEH en Helsinki.

Post la fermo de la kunsido la estraro daŭrigis la diskutojn dum komuna tagmanĝo.

## Heta Kesälä – Honora Membro de UEA

Kiel honoraj membroj de UEA povas esti elektitaj esperantistoj, kiuj faris elstarajn servojn al la tutmonda Esperanto-movado. La komitato de UEA dum sia sabata kunveno en la ĉi-jara kongreso decidis doni la titolon al ok esperantistoj, inter ili Heta Kesälä de Finnlando.

Heta Kesälä jam vendrede alflugis Vilnon por partopreni sian 33an kongreson, sed pro malforteco ŝi jam en la unua tago devis esti transportita de sia hotelo al malsanulejo. Dum la dimanĉa malfermo la novaj honoraj membroj estis anoncigitaj kaj la publiko forte aplaudis dezirante al Heta bonan resaniĝon. La ĝenerala direktoro de UEA Osmo Buller, la prezidanto de EAF Anna Ritamäki kun la sperta esperantistino Terttu Tyynelä poste vizitis la malsanulejon por oficiale transdoni la salutojn. Carola Antskog aranĝis ke Heta la sekvan tagon povis partopreni en la kongresa bankedo. Tie la prezidanto de UEA Renato Corsetti anoncis ŝian ĉeeston kaj ŝi havis okazon persone akcepti la gratulajn vortojn kaj aplaŭdojn. Heta reflugis al Finnlando merkrede por pasigi iom da tempo en malsanulejo.

La honoraj membroj de UEA ne pagas aliĝkotizon al UK. Ili estas aŭtomate aldonitaj al la

listo de aliĝintoj. Nepartoprenintoj ricevas post la kongreso la kongresajn dokumentojn perpoŝte.

Novaj honoraj membroj krom Heta Kesälä estas Roman Dobrzynski, Ursula Grattapaglia, Boris Kolker, Telesforas Lukosevicius, Duilio Magnani, Stevens Norvell kaj Andrzej Pettyn.

**EAF kaj komitatanoj, interalie la du de Finnlando, prezentis al UEA la proponon pri Heta Kesälä. Jen la propona teksto.**

*Kimito la 15an de aprilo 2005*

Ni petas vin prikonsideri la sekvan proponon por honorigo de multmerita esperantistino.

### **Priskribo de servoj kaj meritoj**

Heta Kesälä estas persono, kiu plendediĉe kaj multflanke kontribuis al la bono de la esperantomovado. Ŝi lernis esperanton kiel infano en la Esperantujo fama lernejo de Somero, sed nur poste vere ekaktivis instigita de la pozitivaj spertoj dum la Universala Kongreso en Helsinko 1969. Ŝi komencis konatiĝi kun la movado kaj ▷



*La ĝenerala sekretario de UEA Ulla Luin havis eblecon gratuli la novan honoran membron Heta Kesälä dum la kongresa bankedo.*

alprenis gravajn taskojn, sed ne nur tiuj taskoj (sube) priskribas la enhavan flankon de ŝiaj meritoj. Speciale gravas ŝia daŭra atento pri la aktivuloj, pri kio bona ekzemplo estas ŝiaj multaj poŝtkartoj de la kongresoj, kiujn ŝi fidele partoprenis. Ŝia nomo ofte videblas en la listoj de pagantoj al la diversaj fondaĵoj de UEA.

En Finnlando ŝi portis multajn tre centrajn postenojn de la movado. Ankaŭ post la estrarana periodo en EAF ŝi ofte sekretariis en la jarkunvenoj kaj agis kiel revizoro. Heta atenteme prizorgis la taskojn de ĉefdelegito kaj peranto de UEA ĝis ŝi ĉi-jare devis konstati ke ŝia sanstato ne plu ebligas al ŝi ties daŭran plenumon. UEA estas inter Finnlandaj esperantistoj alte taksata. Heta estas inter la gravaj kontribuantoj al tiu etoso.

### Vivpriskribo de la kandidato

Heta KESÄLÄ naskiĝis la 17-an de decembro 1934. Ŝi lernis Esperanton kiel devigan lernofakon en la lernejo en Somero kaj en pli libera formo en lerneja klubo post la instruhoroj. Ŝi ekaktivis movade post la UK en Helsinko 1969, kiun ŝi partoprenis. Ekde tiam ŝi partoprenis preskaŭ ĉiun UK-n. Longtempe ŝi servis en diversaj funkcioj en la estraro de Esperanto-Klubo de Helsinko. Ekde 1973 ĝis 1995 ŝi estis estrarano de Esperanto-Asocio de Finnlando (1974-1985 kiel sekretario). En 2005 ŝi estis nomumita Honora Membro de EAF.

En UEA Heta Kesälä membriĝis en 1969; ekde 1974 ŝi estas dumviva membro. Ŝi estas regula membro de Societo Zamenhof ekde 1976. Ekde 1975 ŝi estas delegito de UEA kaj ekde 1976 fakdelegito pri komputiloj kaj turismo. Kiel ĉefdelegito kaj kotizperanto de UEA ŝi servis 1990-2005. Ŝi estis vicprezidanto de LKK de la 80-a UK en Tampere en 1995.

Nome de la estraro de Esperanto-Asocio de Finnlando kaj propranome,

*Anna Ritamäki*

*Prezidanto*

*Komitatano A de UEA*

## Zamenhof ajattelijana ja tulevaisuuden näkijänä

Puolalainen silmälääkäri Lazaro Ludoviko Zamenhof (1859-1917) tunnetaan suunnitelma-kielen esperanton luoja. Hänen toimintansa rauhanmiehenä, humanistina ja tulevaisuuden näkijänä on jäänyt vähemmälle huomiolle. Kuitenkin useat Zamenhofin ajattelutyön tuloksena syntyneet tulevaisuuden hahmotelmat ovat edelleenkin ajankohtaisia.

Ehkä mielenkiintoisinta on se, että Zamenhof piti tärkeänä tavoitteena yhdistynyttä Eurooppaa, Euroopan valtioiden liittoa. Hänen visioihinsa kuului myös hahmotelma Eurooppa-oi-keudesta, jossa käsiteltäisiin niitä tapauksia, joissa jokin valtio on syyllistynyt epäoikeudenmukaisiin tekoihin jotakin maata vastaan. Nämä Zamenhofin ajatukset olivat utopioita viime vuosisadan alkupuolella. Tänä päivänä ne ovat lähestulkoon kirjaimellisesti toteutuneet tai toteutumassa.

Zamenhof piti selvänä myös sitä, että ajan myötä yksi valuutta tulee korvaamaan kansalliset valuutat Euroopassa. Tämä käy ilmi hänen vastauksessaan Rene de Saussurelle, joka ehdotti kansainvälistä valuuttaa v. 1906: ”Älä hylkää ideaasi, sillä ennemmin tai myöhemmin ajatuksesi toteutuu”. Tänä päivänä Rene de Saussuren idea on arkipäivää 12 maassa. Euro on jo 300 miljoonan ihmisen maksuvälineenä.

### Kirje kansojen edustajille

Kun ensimmäinen maailmansota oli alkanut Zamenhof kirjoitti eri maiden diplomaateille käsitteensä sodasta ja rauhasta. Hän yritti omalla hieman naivistisellä tavallaan vaikuttaa kansojen edustajiin. Hänen sanansa eivät saaneet vastakaikua, kuten eivät niin monen muunkaan ajattelijan varoittavat sanat. Aseiden pauhu peit-

ti alleen humanistiset aatteet ja humanistien rauhaan tähtäävät pyrki-mykset.

Zamenhof kirjoitti, että ”jos jonkun maata vallataan ihmisen tai kansan hyväksi, silloin tehdään vääryyttä toista ihmistä tai kansaa kohtaan.” Vapauttamisen nimissä tehtyjä valloituksia hän piti viisasteluna.

Hän myös varoitti luomasta Euroopalle uutta karttaa. Siitä ei olisi hyviä seurauksia. Se vain antaisi aineksia uusille sodille.

Miten oikeassa Zamenhof olikaan. Viime vuosisata oli Euroopalle tuhoisa. Parisenkymmentä vuotta ensimmäisen maailmansodan jälkeen Eurooppa oli taas liekeissä. Syttyi toinen maailmansota, joka kosketti julmalla tavalla myös Zamenhofin jälkikasvua. Vain yksi hänen lapsenlapsistaan, Ludoviko Kristoforo Zalenski-Zamenhof, pelastui kuin ihmeen kaupalla Varsovan getosta. Hänet onnistuttiin kuljettamaan ruumiiden seassa geton ulkopuolelle turvaan pois Gestapon kynsistä. Nykyisin Zalenski-Zamenhof, joka loi uran menestyvänä rakennusinsinöörinä, asuu Pariisissa. Hän hallitsee hyvin isoisänsä luoman kielen. Siitä ovat esimerkiksi kongresseissa pidetyt puheet ja artikkelit esperanto-kielissä lehdissä.

Zamenhof sanoo arvostavansa tasapuolisesti kaikkia kansoja. Ihmisen arvon mittana hän ei pidä syntyperää, vaan persoonallisuutta ja ihmisen toimintaa. Hän piti barbaarisena jokaista loukkausta ja vainoa perustuipa se kieleen, uskontoon tai kansallisuuteen. Hänen filosofiansa mukaan jokainen maa kuuluu täysin oikeuksien asukkailleen niin moraalisesti kuin materiaalisestikin.

Zamenhofin teksteistä voi päätellä, että hän ei arvostanut kansallista intoilua, jota hän piti ihmisvihan ilmentymänä ja esteenä kansojen



rauhanomaiselle yhteistyölle.

### Uskonnot ovat samankaltaisia

Vaikka Zamenhof oli uskonnollinen, hänen juutalaisuutensa ei rajoittanut häntä arvostelemasta omia uskonveljiään. Juutalaisuuden ongelmana hän piti ”juutalaisuutta”. Hän vaati juutalaisten uskon puhdistamista, jottei se olisi kaiken esteenä. Nämä Zamenhofin sanat eivät miellyttäneet silloisia aikalaisia eivätkä ne taitaisi miellyttää tänä päivänäkään kaikkia juutalaisia.

Heimoihin ja kansallisuuksiin liitetyt uskonnolliset taistelut hän käsitti ryhmäitsekkyudeksi ja ihmisvihaksi, joka joutuu enemmän tai myöhemmin tappiolle. Tätä tappiolle joutumista hän sanoi edistävänsä kaikin voimin.

Zamenhofin elämän ohjenuorana oli se, että jokainen toimikoon siten kuin haluaisi toisten toimivan ja se että jokainen kuuntelisi oman tuntonsa ääntä. ”Kaiken muun minä pidän uskonnossani legendoina tai uskonnollisina tapoina, jotka ovat ihmisten määrittelemiä.”

Jokainen ihminen kuuluu johonkin perinteelliseen uskontokuntaan, muttei sen tähden, että se vastaisi hänen käsityksiään, vaan sen tähden että hän syntyi siihen, kirjoitti Zamenhof.

Zamenhofin mukaan kaikkien uskontojen sisältö on samankaltainen. Ne erottuvat toisistaan vain legendoiltaan ja tavoiltaan, jotka eivät ole riippuvaisia ihmisen omasta valinnasta. Ketään ei voida ylistää tai moittia hänen perinteellisen uskontonsa tähden. Ihmisen pahat ja hyvät teot eivät riipu hänen uskonnostaan, vaan ihmisestä itsestään ja hänen elinympäristöstään.

Kun katselee maailman menoa avoimin silmin, huomaa, etteivät 1900-luvun alkupuolella lausutut Zamenhofin ajatukset ole menettäneet merkitystään meidänkään aikanamme. Uskontoa käytetään edelleen keinona ajaa omia poliittisia ja taloudellisia tavoitteita. Näin tapahtuu eri puolilla maapalloa.

*Erkki Röntynen*

## Nova vojmontrilo al movada pasinteco

En Vilno dum la 90-a UK oni enmanigis al mi tute freŝan verkon **Historio de Esperanto**. Temas pri 128-paĝa eldonaĵo, kies kolora kovrilo kun interesa foto tuj kaptis mian atenton. Pasinteco de nia movado signifas al mi malluman krepuskon, kvankam mi jam pli frue sekvis paŝojn de Edmond Privat, Marjorie Boulton, Adam Zakrzewski, Wendy Heller kaj Zofia Banet-Fornalowa. La verkinto **Aleksander Korĵenkov** montris al mi novan vojon, kiu estas facile sekvebla, kvankam mia kadukiĝanta memoro jam iomete komencis bremsi kaj kateni efikan agadon.

Komence oni kompreneble prezentas d-ron L.L. Zamenhof, la iniciatoron de Esperanto. Apartan atenton la verkinto donas al ekstermovadaj detaloj, por ke legantoj ekkonu el tiu flanko

la vivon kaj la mondkoncepton de la kreinto de la internacia lingvo Esperanto. Multaj leterfragmentoj trafe ilustras la rakontadon. La teksto havas amase detalajn informojn kaj ciferojn. Tamen estis eble progresi kun ili kaj ne perdi la fadenon de la verko. Ni scias, ke ĉiam minacas danĝera ebleco kvazaŭ droni en oceano de tro multaj etaj scieroj. Eĉ nefakula leganto sukcese navigacias sur niamovada historia maro dank’ al konciza, sed ankaŭ riĉe viva plumuzado de Aleksander Korĵenkov.

En la ĉapitro “Antaŭ la internaciaj institucioj” malfermiĝas multflanka bildo pri agado de Ligo de Nacioj koncerne la lingvajn problemojn. Asista ĝenerala sekretario de LN Inazo Nitobe partoprenis la 13-an UK:n en Prago 1921 kaj post ĝi li verkis raporton “La lingva problemo kaj la Ligo de Nacioj”, en kiu li pozitive taksis Esperanton kaj nomis ĝin ‘motoro de internacia de-

mokratio’. Oni favore rilatis al Esperanto en tiu ĉi mondorganizaĵo. Kompreneble kelkaj deputitoj subtenis la anglan kaj iuj usonanoj proponis revivigi la latinan. Pli poste francaj delegitoj en LN kaj la franca ministro pri publika instruado sisteme kaj forte komencis agi kontraŭ la Zamenhofa lingvo. En septembro 1922 oni voĉdonis (26 por kaj 2 kontraŭ) pri favora raporto por Esperanto. Tiu oficialigo de la valoroj de nia lingvo fare de la plej prestiĝa internacia organizo estis grava atingo, kvankam ĝi ne havis praktikan daŭrigon.

Eblas ĉi tie mencii nur iujn erojn el la verko, kiu meritas nian atenton. Aleksander Korĵenkov sukcesis kompili etan giganton, kiu taŭgas por spertuloj kaj novicoj. Klarigaj notoj sur la lastaj paĝoj pliprofundigas legadon. Same biografietoj certe utilas al ĉiuj, kiuj studas pri fazoj de nia movado. Ni povas facile kontroli kaj relegi informojn koncernantajn niajn movadajn korifeojn. La lasta ĉapitro titoliĝas: “Post la

falo de la Berlina muro”. Tio signifas, ke la aŭtoro traktas okazintaĵojn ĝis la hodiaŭa tago. Kompreneble oni povas tion fari nur supraĵe, sed mi ĝojas pro la verkista kuraĝo alfronti la malfacilan taskon resumi ĵusajn okazaĵojn. Konata verko *Esperanto en perspektivo* (1974) servas fakulojn kaj entuziasmulojn. Ĝi estas kvazaŭ peza briko kun 844 paĝoj – en teko ne sufiĉas loko por ĝi. Por ĉiu tre taŭga *Historio de Esperanto* estas kunpreninda kaj -ebla. En mia dokumentujo la produkto de Aleksander Korĵenkov havas privilegiitan lokon kaj mi utiligas ĝian admirindan enhavon kaj por plezuro kaj por studado. *Dankon kaj gratulon – Aleksandro!*

Jorma Ahomäki

EAF vendas la libron je 12 eŭroj, skribu al la oficejo aŭ [eafmendoj@esperanto.fi](mailto:eafmendoj@esperanto.fi) (libroserva respondeculo Päivi Saarinen) aŭ aĉetu dum renkontiĝo.

### HISTORIO

### DE ESPERANTO



Verkita de Aleksander Korĵenkov

Serio Scio. Volumo 5

## Taglibro de mia frato

*Chava Pressburger. Kava-Pech, Dobrichovice 2005. 136 p. plus bildaldonoj. Elĉeĥigis Vlastimil Novobilský kaj Vera Novobilská.*

La knabo, kiu skribis la taglibron, vere ekzistis. Li nomiĝis Petr Ginz (1928-1944). Lia fratino Eva, (poste nomota Chava Pressburger), trovis la taglibron en la koncentrejo Terezín, kiam Petr estis jam sendita al la tiam nekonata celo, Aŭŝvico. “Kial li, kial ne mi?” ŝi demandas. La frato estis promesplena junulo, kiu eĉ en la plej malfacilaj kondiĉoj esperis: “La semo de krea ideo ne pereos en koto kaj ŝlimo... ĝi burĝonos kaj disvolvos sian petalkronon kiel stelo brilanta en malhelajoj”. Kiam oni provis neniigi judojn unue ne fizike sed anime kaj morale, Petr skribis: “Es-tante senigitaj de la estintaj fontoj de kulturo ni kreas novajn. Disigitaj de la fontoj de la iama ĝojo, ni kreas por ni novan kaj ĝoje jubilantan



*Petr Ginz: Noktaj floroj.  
Linogravuraĵo sur papero.*

vivon.” Sed oni neniigis lin fizike, kiam li havis nur 16 jarojn.

La taglibro rakontas pri familia kaj lerneja vivo en Prago en 1941-1942. La junulo skribas lakone, simple, po unu-dudek liniojn tage. Li mencias siajn petolaĵojn, sukcesojn en lernejo, hejmtaskojn, ludojn kun kamaradoj, regule pri-skribas la veteron, rakontas pri naskiĝtagoj. Ĉiu provas adaptiĝi al la pli kaj pli malboniĝanta vivo, al la limigoj kaj malpermesoj, konfiskado de ĉiutagaj bezonataĵoj. Li ne plendas, li nur konstatas. Nur sian transporton al Terezín kaj sian ekscion pri ĝi li priskribas pli detale. Post lia transporto al Aŭŝvico daŭrigas la taglibron lia fratino, kaj la libron ŝi kompilas sub sia nuna nomo. La libron kompletigas ŝiaj plenkreskulaj notoj kaj rimarkoj, familiaj fotografiaĵoj, fotokopioj de kelkaj originalaj paĝoj, desegnaĵoj kaj akvareloj de la frato, fragmentoj el liaj romanoj kaj el la gazeto Vedem, kiun li redaktis en Terezín. Li tie ankaŭ komencis kompili Esperanto-ĉeĥa -vortaron, el sia memoro.

Kvankam tio certe ne estis la celo de la skribinto, la taglibro montras al la leganto racie planatan, insidan, mense sufokan atakon kontraŭ nearjoj kaj la nekomprenemon, naivon de la viktimoj, kiuj eĉ kunlaboris kun la germanoj por pretigi la transportojn, sen scii la finan celon. Leginte la libron oni iom scias pri la intrigoj de la homa malbono. Ili ne ĉiam flagras sed okazas kaŝe kaj kaptas nin enrimarke, antaŭ ol ni havas tempon vere timiĝi, kontraŭbatali aŭ fuĝi.

Foto pri Petr Ginz kaj lia desegnaĵo *Luna pejzaĝo* aperis sur ĉeĥa poŝtmarko emisiita okaze de la averio de la usona kosmoŝipo Columbia STS 107, kie la tuta ŝipanaro pereis. Reprodukt-aĵon pri la Luna pejzaĝo havis kun si israela ŝipano. Tio helpis al la famiĝo de Petr.

Fine de la libro Vlastimil Novobilský rakontas pri la esperanta medio de familio Ginz. La direktoro de la Juda muzeo en Prago librokomece traktas la demandon, kiel oni povus kvitiĝi kun la ŝoa, t.e. la holokaŭsto.

*Saliko*



## Interesaj retaj eblecoj

La estraro en sia kunveno la 21-an de aŭgusto informiĝis pri du gravaj Esperantoretejoj.

LERNU.NET estas multflanka paĝaro por senpage lerni Esperanton. La finnan version de la paĝaro realigis Teuvo Alavillamo el Siikainen, kiu ankaŭ estas reta lingvohelpanto por lernantoj de la lernu-kurso Ana Pana. Estas preta pdf-formata informilo i.a. en la finna kaj sveda, kiun la prezidanto disdonis. Ŝi ankaŭ montris liston de finnaj registritaj lernuanoj kaj instigis al reklamado de la paĝaro. Registritaj en lernu estas (20.08.05) 17 225 personoj el inter kiuj 14 060 el 188 landoj indikis sian landon, 226 el Finnlando. Pluraj registritoj havas nevideblan profilon. En la finnlingva paĝaro estas 204 uzantoj.

La reta libera VIKIPEDIA-enciklopedio ekzistas en Esperanto ĉe eo.wikipedia.org. Ĝi ankaŭ havas artikolojn pri Esperanto en diversaj lingvoj. En Suomenkielinen Wikipedia troviĝas multe da informoj pri Esperanto (fi.wikipedia.org/wiki/Esperanto). La finnlingvan artikolon redaktis ĉefe Antti Leväsaari el Lapinlahti.

---

## Eventokalendaro de EAF

### 2006

25-26.3.2006 Vintraj Tagoj, Turkuo

23-27.4.2006 EAS lige kun Euroscola-tago, Strasburgo, Francio (ELFI)

3-7.7.2006 Esperantokursoj en Valamo (Valamon kansanopisto)

29.7-5.8.2006 Universala Kongreso, Florenco, Italio (UEA)

6-13.8.2006 Internacia Junulara Kongreso, Sarajevo, Bosnio (TEJO)

### 2007

28.4.2007 100-jariĝo de EAF

### EAF-laborkunvenoj

29.10.2005 EAF-estraro

## Eŭropa Amikeco-Seminario 2006

La junulgastejo CREPS, la loko por Eŭropaj Amikeco-Seminarioj 2004 kaj 2005, havas bonajn ejojn kaj por grandaj renkontiĝoj kaj por grupaj laboroj. En la bildo de EAS-2005 vi vidas la finninojn Camilla kaj Marjaana diskuti kun slovenaj geamikoj. En la malantaŭo Carola ludas vortomozaikon kun franco kaj ĉeĥino. Fotis Zlatko Tišljar el Slovenio. Laŭ la nunaj planoj EAS-2006 okazos 23.-27.4. en la sama loko. Partoprenos gelernantoj de Somero kaj estas ebleco ankaŭ por aliaj junaj esperantistoj anonci intereson al mi, ekz. aliaj lernantoj de lernu.net.

*Carola Antskog*

*(cantskog@kolumbus.fi, 050-581 7272)*

---

### *Karaj geamikoj,*

Elkoran dankon al vi ĉiuj, kiuj memoris min okaze de mia granda tago. Venis multege da gratulkartoj kaj -leteroj kaj dudeko de esperantistoj ĉeestis en mia festo la 8an de oktobro. En la festo esperantistoj ĝojigis min kun multaj diversaj programeroj, ĝuste kiel mi petis. Estis kantoj kun kunludado, poemoj, ĉiĉeronado kaj festparoloj en la internacia lingvo en amuza kaj gaja maniero. Mi mem ricevis bonan ekzercon, kiam mi la unuan fojon provis uzi la germanan kaj Esperanton sinsekve kaj kune; ambaŭ estas por mi gravaj kaj karaj lingvoj pro diversaj kialoj. Kaj aparte min ĝojigis kontribuo de kelkaj festantoj al la Societo Nino Runeberg.

Do, ek al la nova jardeko! Aĝi kaj fariĝi 50-jara tamen ne estas tiel stranga kaj terura fenomeno kiel mi pensis komence de tiu ĉi jaro. Kun bonegaj amikoj la travivaĵo estas feliĉa. Mi certas, ke vi kiuj ne povis ĉeesti, kunfestis kun ni en spirito.

*Amike Tiina (Tiina Oittinen)*



*Foto de  
EAS-2005.*

## Mirindaj apartaĵoj de la lingvo

Mi ofte aŭdas aserton, ke la finna estas unu el la plej malfacilaj lingvoj de la mondo. Sed mia opinio pri tio estas tute mala. Laŭ mia opinio finna lingvo estas unu el la plej facilaj kaj interesaj lingvoj. Ĝi havas interesajn apartaĵojn. Stud-analizante la lingvon pere de aplik-eblecoj de Esperanto kaj elementoj de mia profesia scio, mi atingas komprenon de la apartaĵoj kaj kaŭzoj, kiuj ŝajnigas la lingvon malfacila.

Supredirito tute ne pruvas, ke mi parolas finnan lingvon. Mi ja neniam havis bonan memorkapablon kaj des pli nun, kiam mi estas preskaŭ sepdekjaraĝa. Por ricevo de finna civitaneco, mi ne bezonis elteni lingvan ekzamenon, ĉar la leĝo ne postulas tion de pensiuloj.

Iam oni demandas min, ĉu helpas kompreni apartaĵojn de la gepatra lingvo mia genetika heredaĵo? Eble iu legis pri tiu fenomeno en artikolo 'Lingva atavismo' el revuo 'Monato'. Mi

neniam sentis ion similan. Tamen en mia pensmaniero kaj aparte en inklino al abstraktaĵoj mi supozas esti influo de la genetika heredaĵo. Kaj mia inklino pensi uzante objektivajn leĝojn de naturo enforme de matematikaj figuroj siatempe helpis min bone lerni sen havi sufiĉan memorkapablon. Kaj nun ĝi helpas kompreni la lingvon. Do al mi ne estas problemo respondi la demandon "Housut jalkaan vai jalat housuun?" (Esperantolehti 3/2005). Kaj nome similaj apartaĵoj de finna lingvo instigis min vidi la lingvon de nekutima flanko. Al tradicia lerno de la lingvo, kiun mi kondiĉe nomu 'struktura', mi kontraŭstaras la alian, kiun mi kondiĉe nomu 'kompreniga'.

En tiu kunteksto mi volas esprimi grandan dankon al la lando de miaj gepatroj, kie mi trovis eblecon okupiĝi pri tiu ĉi krea laboro kaj al miaj amikoj – gvidantoj de la urba E-movado Esa Lång kaj Martti Pennanen, kiuj ebligis mian aperon ĉi tie.

*Vilorg Teräväinen, Lahti, 28.08.2005.*

## Fejon syksy 2005

**Keskustelupiiri** 12.10.-23.11. klo 18.15-19, Ravintola Teerenpeli, Vuorikatu 16, Helsinki. Ohjattua keskustelua esperantoksi ajankohtaisista aiheista ja maailman parantamista. Illat vetää Patrik Austin.

**Uusien ilta** 7.12. klo 19, Siltasaarenkatu 15 C 65, Helsinki. Syksyn kurssien uusi väki ja vanhat konkarit tapaavat. Viiniä, laulua ja patonkia!

Muutakin järjestetään voimien ja innon mukaan, joten seuraa Fejon postituslistaa! Jos et ole vielä liittynyt, lähetä tyhjä sähköpostiviesti osoitteeseen [fejo-subscribe@yahoogroups.com](mailto:fejo-subscribe@yahoogroups.com)

## EsperHe porskuttaa

Varmoja syksyn merkkejä ovat sateenvarjat, kirpeät aamut (?) ja kaduilla vyöryvät opiskelija-laumat. Koulut ja oppilaitokset ovat jälleen avanneet ovensa ja myös kaksi vuotta sitten perustettu Helsingin yliopiston esperantoseura EsperHe jatkaa toimintaansa.

Syksyn perinteinen startti oli osallistuminen yliopiston avajaiskarnevaaleihin syyskuun alkupuolella. EsperHe piti tapahtumassa omaa kolujaan ja jakoi infoa tulevista tapahtumista. Samana viikonloppuna EsperHe kokosi joukkonsa myös sählyn ja saunan pariin.

Myös tänä syksynä EsperHe järjestää yliopiston opiskelijoille esperanton opintopiirin, jonka suorittamisesta saa yhden opintoviikon. Opettajana on tällä kertaa Patrik Austin. Virallisen kurssin jälkeen siirrytään muiden Helsingin seudun harrastajien kanssa keskustelupiiriin Ravintola Teerenpeliin. Siellä on luvassa rentoa keskustelua ajankohtaisista aiheista.

## Miten jäseneksi?

EsperHeen jäsenyys vuodelle 2005 maksaa HYY:läisille 3 euroa, jonka voit maksaa tilille 157235-359096. Lähetä sähköpostiosoitteeseen [fejo@esperanto.fi](mailto:fejo@esperanto.fi) viesti, josta käy ilmi nimesi, syntymävuotesi, osoitteesi sekä tiedekuntasi



*EsperHe:en viime syksyn kurssin keskustelu-harjoituksissa puhe soljui ja nauru raikui. Osa kurssilaisista innostui jopa lähtemään tuoretta kielitaitoa kokeilemaan Italian IJF:hon ja Puolan IJK:hon!*

Helsingin yliopistossa.

Kannatusjäsenyys maksaa 12 euroa. Toimiylläolevien ohjeiden mukaisesti, mutta nimi ja kotiosoite riittävät.

## Diskejossa nyt uutuuksia!

Jos et päässyt selaamaan Diskejon uutta levyvalikoimaa KEF:ssä, niin ei hätää. Vielä on jonkin verran tuoretta tavaraa tarjolla.

Suosittellemme mm:

**Tom Jobim, Brazila Kolekto** – Etelä-Amerikan esperantotähdet Flávio Fonseca ja Alejandro Cossavella ovat tuottaneet yhdessä kokoelman Brasiliassa suosittuja Tom Jobimin kappaleita. Esperantokäännökset ovat mm. Fonsecan, Cossavellan ja Personen Bertil Wennergrenin käsialaa.

## H.C. Andersen

Dana fabelonklo H.C. Andersen naskiĝis en Odense, ĝemelurbo de Tampere, antaŭ 200 jaroj en la 2.4.1805, mortis 4.8.1875 en Kopenhago. Li estas ege fama en la tuta mondo, liajn fabelojn konas milionoj da infanoj. Li estas unu el la plej tradukitaj verkistoj en la mondo laŭ listo de Unesco.

Li volis estigi ĝojon por infanoj, kvankam lia vivo eble estis iam sen ĝojo.

Nun 200 jarojn post lia naskiĝo oni organizis kaj organizos multajn aranĝojn kaj festojn por honorigi lian memoron en Danio kaj en la tuta mondo, ankaŭ en Finnlando kaj Tampere.

Unu interesa afero en ĉijara festado estas H.C. Andersen -delegitoj. Ili estas 170 konataj kaj famaj personoj el la tuta mondo. Ilia tasko estas rakonti pri Andersen kaj propagandi la kampanjojn pri legoscio plejparte en la tria mondo.

Inter la Finlandaj delegitoj estas i.a. Eeva Ahtisaari, edzino de la eksa Finnlanda prezidento. Inter la mondaj delegitoj estas i.a. futballegendo Pelé kaj filmstelo Roger Moore.

En NESTO (Satakunnankatu 30 C 6, Tampere) nia librejo havas sekvajn Esperantajn librojn de H.C. Andersen: "Fabeloj", tradukis L.L. Zamenhof, 240 paĝoj, 1963. "Fabeloj de Andersen", tradukis F. Skeel-Giörling, 42 p., 1909. "La Marvirineto", Ib Schleicher, 53 p., 1962.

*VH (prenita el Vekilo 2/05)*

**Flávio Fonseca kaj Geraldo Mattos: Simbiozo** – Fonsecan ja runoilija Geraldo Mattosin yhteistyön hedelmä. Mielenkiintoinen yhdistelmä mm. eteläamerikkalaisia rytmejä, sambaa, bossa novaa jne. Paljon vierailevia muusikoita.

Hinnat: – käteisellä 17 euroa – postitse 18,50 euroa

Tsekkaa valikoima ja tee tilaus osoitteessa <http://www.esperanto.fi/fejo/diskejo.htm>

## Muut lehdet kirjoittivat KEFistä ja Valamosta

Kesän KEF-festivaaleista kirjoitettiin Hufvudstadsbladetissa 16.7. ja Helsingin Sanomissa 15.7.

Jälkimmäinen artikkeli oli Jorge Camachon haastattelu, jossa hän kertoi Tapasimme-juttusarjassa paitsi omasta työstään tulkkina, myös esperanton kielitaidostaan ja kirjoituksistaan. Jutussa kerrotaan hänen olevan Kultura Esperanto Festivalon kirjallisuuden pääesiintyjä.

Esperantosta hän kuuli TV-ohjelmasta 14-vuotiaana, ja se oli kiinnostavaa. HS kertoi Jorgen luennoivan KEFissä skotlantilaisesta, esperantoksi kirjoittavasta kirjailija William Auldista, esperantosta elokuvissa, esperantonkielisestä rock-lyriikasta ja tsekkikirjailija Karolo Pichistä.

Portugalilainen Jorge Camacho opiskeli Madridissa aikanaan arabialaista filologiaa, mutta opiskeli myös suomea mm. Oulun yliopistossa. Hänestä tuli EU:n suomen kielen tulkki kielitaitonsa vuoksi.

Hufvudstadsbladetissa esiteltiin ”Nya språk”-otsikon alla esperanto. Otsikko toki pitää paikkansa, kun ajattelee, minkä ikäisiä maailman muut kielet ovat, mutta kuten jutun tietolaatiossa mainittiin, esperanto syntyi 1887, joten ei sitä aivan eilen ole kehitetty.

HBL haastatteli Riitta Hämäläistä. Jutussa mainitaan viikon mittaisen KEF-tapahtuman alkaminen. Riitta totesi, että esperantoa opiskelevat ovat ehkä keskimääräistä enemmän kielellisesti lahjakkaita ja lisäksi kiinnostuneita ihmisten välisestä kanssakäymisestä. Kieli syntyi yhteiskieleksi, joka rakentuu kielen tasa-arvon perustalle toisin kuin esimerkiksi englannin kieli. Kielen synnyn kansainvälisen taustan vuoksi esperantokulttuuri on ideologinen ja värikäs. Kieli kehitettiin täydentäväksi kieleksi kaikkien käyttöön niin, ettei joillakin olisi kielellistä yliotetta. ▷

”Oman alakulttuurinsa jäsenenä jotkut puhuvat perheen kotikielenä esperantoa, ja muun muassa sen kautta kieli vahvistuu edelleen, niin, että se ei ole vain lyhytaikainen muotikieli”, sanoo Riitta. Jutun valokuvassa esiintyvät KEF-tapahtuman muusikko Alejandro Cossavella, oopperalaulaja Liisa Viinanen ja runoilija Jorge Camacho. Esperantoa esittelevässä kainalotutussa mainittiin kielen syntyä, kielen kehittämisen perusteet kansainväliseksi kieleksi, sen rakentuminen olemassa olevien kielten perustalle, esperanton käyttäjien määrä nykyään sekä muutamia esperantoksi käännettyjä kirjoja.

Lappeenrantalaisessa Etelä-Saimaa -lehdessä 23.7. haastateltiin Jorma Toropasta hänen esperanton taidostaan ja hänen osallistumisestaan Vilnan kansainväliseen Esperanto-tapahtumaan. Lappeenrannasta mukana oli kaikkiaan neljä esperantistia.

Jorma Toropainen tutustui kieleen 35 vuotta sitten tuttaviansa kautta, ja osallistui Wienissä kielen konferenssiin. Hän näki, kuinka kieli toimi käytännössä eri äidinkieltä puhuvien välillä ja innostui siitä itsekin. Hän on matkustanut runsaasti harrastuksensa vuoksi ja saanut lukuisia tuttuja sen avulla. Kirjeenvaihto, lukeminen ja esperanto-kursseihin osallistuminen pitää kieltä yllä.

”Suomenkielisille esperanton opiskelu on helppoa, kun kirjoittaminen on äänne- ja kirjaimellisesti mukaisempaa.”

Toropainen opetti esperantoa Lappeenrannan työväenopistossa 1970- ja 80-luvuilla, mutta nyt hän arvioi kielen olevan monessa maassa aallon pohjassa, kun englannilla on valta-asema.

”Kieli on yhä maailmankieli, koska sitä osataan kaikissa maanosissa. Puhujamäärän osalta sen pitäisi tulla myös maailmankieleksi.”

Hämeenlinnassa ilmestyvässä Kaupunki-uutiset-lehdessä haastateltiin 30.7.2005 Markku Sarastamo esperanto-harrastuksesta.

”Esperantoelämä on ollut täällä hiljaista”, hän sanoo ja haluaa pitää alkeiskurssin Hämeenlin-

nassa. Markun isä, joka ei osannut esperantoa, innosti häntä kuitenkin sen opiskeluun, ja hän otti yhteyttä aikanaan Vilho Setälään, joka lähetti Markulle ensimmäisen kurssin. ”Ehkä se on ainoita kieliä jotka voi perusteellisesti oppia itseopiskeluna.” Sarastamon mukaan kaikki puhuvat Somerolla esperantoa, kun Joel Vilkki opetti sitä pakollisena kielenä koulussa 1960-luvulla.

Markku lähetti aikanaan 10 maahan kirjeen pelkällä osoitteella ”Esperantoklubi”, ja sai Kinnasta Maon punaisen kirjan esperantonkielisenä, myös New Yorkista vastattiin ja Vatikaanin radiosta tuli ohjelmatietoja esperantonkielisistä uutisista. Hän esittelee lisäksi Pasporta Servo-majoitusjärjestelyn. Markun mielestä kieli on kaikkea muuta kuin kuollut.

Heinäveden lehdessä (29.6.), Savonlinnassa ilmestyvän Itä-Savon viikkojulkaisussa ja Turkulainen-lehdessä (29.6.) julkaistiin lyhyet uutiset Valamon esperantokurssista. Turkulaisessa ja Heinäveden lehdessä mainittiin opettajana toimiva algerialaissyntyinen ja Turussa asuva Mohamed Bettahar. Itä-Savossa haastateltiin lyhyesti Anna Ritamäkeä, joka kertoi, miten hän tutustui 17-vuotiaana esperantoon ja myöhemmin 1987 kansainvälisessä kongressissa pääsi näkemään, miten kieltä oikeasti käytetään. Hän on saanut uusia ystäviä ympäri maailmaa, ja esperanton opiskelu on hyvä tapa viettää lomaa, oppia uutta ja tutustua uusiin ihmisiin.

*Jukka Noponen*

---

## Duplustra ekspozicio en Kirjakahvila

Dum novembro estos ekspozicio pri Duplustroj en kafejo Kirjakahvila en Turku, en korto de Brinkkala-domo apud placo Vanha Suurtori. La ejo apertas lunde-vendrede je 11–19.

# Suomen Esperantoliiton jäsenjärjestöt

**Muutokset ja lisäykset osoitteistoon: Ilkka Santtila, Mannerheimintie 40 D 86, 00100 Helsinki, s-posti [ilkka.santtila@esperanto.fi](mailto:ilkka.santtila@esperanto.fi) mieluummin kirjallisena.**

Suomen Esperantoliiton paikallis- ja jäsenjärjestöt:

- ♦ Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ✉ [taneli.huuskonen@netsonic.fi](mailto:taneli.huuskonen@netsonic.fi) [www.esperanto.fi/helsinki](http://www.esperanto.fi/helsinki)
- ♦ Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Uudispihantie 298, 74100 Iisalmi.
- ♦ Jyväskylän Esperantokerho / Esperantoklubo de Jyväskylä (Seija ja Kari Kettunen), Keihäsmiehenkatu 3, 40630 Jyväskylä. ☎ (014) 254 609 ✉ [kari.kettunen@pp1.inet.fi](mailto:kari.kettunen@pp1.inet.fi)
- ♦ Lahden Esperantokerho / Esperantoklubo de Lahti, (Martti Pennanen) Kalliomaankatu 10, 15150 Lahti. ✉ [martti.pennanen@phnet.fi](mailto:martti.pennanen@phnet.fi)
- ♦ Oulun Esperantoseura / Esperantosocieto de Oulu, (Allan Mehtonen) Valtatie 6-8 B 15, 90500 Oulu.
- ♦ Salon Esperantoseura / Esperantoklubo de Salo (Matti Wallius) Eräpolku 1, 25130 Muurla. ✉ [matti.wallius@ebaana.net](mailto:matti.wallius@ebaana.net)
- ♦ Esperantoseura Antaŭen ry. / Esperantosocieto Antaŭen, Satakunnankatu 30 C 6, 33210 Tampere. (Lauri Liukkonen, Varstatie 37, 37500 Lempäälä, ✉ [lauri.liukkonen@jippii.fi](mailto:lauri.liukkonen@jippii.fi))
- ♦ Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku, (Tiina Oittinen) Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ✉ [tiina.oittinen@pp.inet.fi](mailto:tiina.oittinen@pp.inet.fi)
- ♦ Suomen opettajien esperantoyhdistys / Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj, (Carola Antskog) Brokärrvägen 89, 25700 Kimito. ✉ [cantskog@kolumbus.fi](mailto:cantskog@kolumbus.fi). Tilinro: 800015-129185
- ♦ Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ✉ [fejo@esperanto.fi](mailto:fejo@esperanto.fi). Tilinro: 563000-2213606
- ♦ Sokeiden esperanto-yhdistys Steleto. (Ritva Sabelli) Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. ☎ (09) 660 651

Jäsenyhdistysten jäsenet ovat automaattisesti Suomen Esperantoliiton jäseniä, yhdistykset hoitavat jäsenmaksut liittoon. Liittoon voi myös kuulua henkilöjäsenenä, jolloin jäsenmaksu v. 2005 on 18 e sisältäen Esperantolehden. Nino Runeberg -seuran jäsenmaksu on 36 e. Lisätietoja jäsenyhdistyksiltä ja liiton toimihenkilöiltä.

Lappeenrannassa toimii aktiivinen esperanton harrastajien ryhmä, jolle voi lähettää postia osoitteeseen (Irja Miettinen) Esperantogrupo de Lappeenranta, Yrjönkatu 6-8 A 1, 53600 Lappeenranta.

Useiden paikkakuntien puhelinluettelosta hakusanan "Esperanto" kohdalta löytyy paikallisten harrastajien puhelinnumeroita. Paikkakuntien yhteyshenkilöistä saa tietoa myös Suomen Esperantoliitolta, aktiivisia harrastajia on mm. Mikkelissä, Raumalla, Hämeenlinnassa ja Taivalkoskella.

## ESPERANTOLEHTI

ilmestyy vuonna  
aperas dum la jaro **2005**

Nro	Red.grupo komencas	Limdato	Aperas
6	1.11.	15.11.	5.12.

Avustajien toivotaan noudattavan edellä esitettyjä aikoja. La redakcio esperas, ke helpantoj atentu la datojn supre.

### Ilmoitushinnat ♦ Anonprezoj

Ulkopuoliset mainostajat /


Ekster membraro:	Jäsenet / Membroj:
1/1 sivu/paĝo 100 e	1/1 sivu/paĝo 50 e
1/2 sivua/paĝo 60 e	1/2 sivua/paĝo 30 e
1/4 sivua/paĝo 40 e	1/4 sivua/paĝo 20 e

Sendu la anoncojn aŭ rete al la redaktejo: [eaflehti@esperanto.fi](mailto:eaflehti@esperanto.fi) aŭ poŝte al la oficejo: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki.

Ilmoitukset joko sähköpostitse: [eaflehti@esperanto.fi](mailto:eaflehti@esperanto.fi) tai suoraan liiton toimistoon: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki.

Palautusosoite: Esperantoliitto  
Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki

## duplustro



### Seuraava numero ♦ Venonta numero

Seuraava numero ilmestyy joulukuussa. Jutut 15.11.2005 mennessä EAF:n toimistoon. Venonta numero aperos en decembro. Artikoloj ĝis 15.11.2005 al la oficejo de EAF. Osoite/adreso: Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, puh/tel. (09) 715 538, s-posti/rete: <eafllehti@esperanto.fi>.

Pica-Paino Oy, Jyväskylä 2005